



Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista. 4 FF.
 Unujara abono kun adresaro : 20 FF ĝirotaj al la poŝtkonto
 n° 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto : Cercle amical
espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT, Francio.

NIA REGIONA KUNVENO

okazos

EN: CAMPING DU
 LAC DES TROIS VALLEES
 32700 LECTOURE
 ÂGERSIO (F)


14/15 MAJO



kiel antaŭ 6 jaroj, kiam prepariĝis la fama Lektura
 SAT-Kongreso... Gaskonio restas akceptema kaj bon-
 humora. Ĝis baldaŭ !

Nia baldaŭa renkontiĝo en Gaskonio

Sabaton 14an kaj Dimanĉon 15an de



La loko : "Lac des 3 vallées", apud Lectoure (vd. la planon!)

Aŭtomobiluzantoj iru rekte al la kunvenloko, kie la akceptado okazos ekde la 10a matene, sabaton 14an. Kiuj alvenos per aŭtobusoj, haltu ĉe la centra haltejo en Lectoure (nomita "au bastion"), de kie aŭtoposedantoj veturigos ilin al "Lago de la Tri Valoj". Ĉiuj nepre anoncuisian partoprenon kaj alvenhoron al :

Jean-Claude Bourgeat, St Puy, 32310 VALENCE SUR BAÏSE.

Tranoktado : de sabato al dimanĉo. Eblas tranokti sur la loko mem. Necesas kunporti litkovrilojn kaj littukon. Prezo: 50 F en kvarlita ĉambro, 41 F en seslita ĉambro. Kiuj deziras tranokti en hotelo de Lekturo, tiuj tuj skribu al J.C.Bourgeat.

Manĝoj : Ni piknikos surloke (kie eblas kuiri). Kunportu viajn sandviĉojn kaj ĉion ajn manĝeblan, trinkeblan...

Programo : La programon starigos surloke la partoprenantaro mem (ekz. vivo de la regionaj E-grupoj, raporto pri la SAT-Amikara kongreso, debatoj, ekskursoj, ludoj...). Improvizado ne ĉiam estas malbonaĵo!...

La Tuluza E-Societo ekskursos al MOISSAC, dimanĉon 8an de majo. Rendezuo fiksita je la 8a45, placo Capitole en TULUZO, aŭ je la 11a antaŭ la preĝejo "Saint-Pierre" en MOISSAC. Vizito al la klostro, la preĝejo, la muzeo kaj la ĉirkaŭaĵo. Skribu al : ESPERANTO, 55D, r.des Arcs St-Cyprien, 31300 TOULOUSE antaŭ la 2a de majo. Tel: 59 05 81.

NIA DEBATO :

la modo

(la unua parto aperis en
L! n-ro 47)



Distanciĝi de la fenomeno...

En la franca vortaro mi legas : "Modo estas ne daŭra maniero agi, vivi, pensi, ktp. Modo dependas de medio, de specifa epoko." Ofte modo aspektas kaprica, ekstravaganca, nesaĝa. Eblas, ke ĝi estu reago kontraŭ konformismo, konservativismo, aŭ esprimo de opono. Modo estas homa fenomeno kolektiva, pli facile videbla ĉe junaj generacioj (almenaŭ por kelkaj el siaj multnombraj aspektoj : vestaĵoj, hararaĵoj, lingvaĵoj).

Ĝenerale, modo ne estas temo, kiu pasiigas min, sed post bona pripensado, venas al mi demandoj kaj rimarkoj por mi interesaj, kvankam mi ne kapablas trovi precizajn respondojn kaj fari seriozan analizon :

Kiam aperis modo en la homaj civilizacioj ? Ĉu estas moda fenomeno en ĉiuj socioj ? Kiujn sociajn klasojn plej facile trafas modo ? Ĉu ne estus pli ĝuste diskuti pri "modoj", kiuj sinsekvas aŭ samtempe aperas ? Ĉu ĝi respondas al emoj nur kaprica, bagatela, grega ? Ĉu modo estas je la servo nur de komercistoj, ideologiistoj aŭ iuj ajn profitemuloj ? Ĉu modo estas ĉiam eterna fuĝo antaŭen, rifuzo aŭ timo pli profunde analizi la vivon, pli bone koni sin mem ? En niaj modernaj socioj, en kiuj per la plej diversaj rimedoj oni instigas nin al konsumado, oni "nivelas", ĉu eblas eskapi al iu modo ? Sed tamen, ĉu modo ne alportas fantazion, plezuron, kaj ne helpas al socia integriĝo ? Ĉu ĝi ne atestas pri homa kapableco evolui aŭ almenaŭ sin adapti al ŝanĝoj ? Ĉu ĝi ne fontas el la plej novaj mal-

kovroj, studoj, realigoj teknikaj, sciencaj, kulturaj?

Vasta, multaspekta estas tiu temo!...

Finfine, kiam mi rimarkas, kio iĝas ekologia movado, virina emancipado, edukado, dietistiko... tra la modo, kiam mi sentas maltoleremon, malestimon, por tiuj, kiuj ne estas "en la vento", aŭ deziron provoki, sentofendi la aliulojn, aŭ vantemon sin distingi, zeloton de iuj ajn klananoj (adeptoj aŭ admirantoj de artisto, muziko, sporto...), modo aspektas al mi fenomeno kontraŭ kiu oni devas distanciĝi por provi kompreni, kritiki, kaj, se eblas, libere elekti sian sintenon, esti pli konscia en sia ĉiutaga vivo.

Nicole.

Modo atingas la tutan mondon

Modo estas maniero vivi, momenta aŭ daŭra, persona aŭ kolektiva. Ĉar modo koncernas ne nur vestmanieron, sed ĉiujn kampojn de nia vivo, ĝi ĉeestas nian manieron pensi, paroli, konstrui, manĝi. El tio naskiĝis nacioj, ĉiu vivanta laŭ persona modo.

Tiun modon regas klimato (ekzemple, polusa malvarmo influas malsame ol sahara fajro). En la komenco ĝi havis vivnecesan kaj sanktan signifon. Ĝi ankaŭ signis hierarkion. Pli poste, kun plifaciliĝo de la ĉiutaga vivo (dank'al scienco kaj tekniko) aperis "sociaj klasoj" kun ĉiu sia "modo". Nun, kvankam plu ekzistas klasoj kreitaj de la mono, la modo fariĝas pli unuforma kaj atingas la tutan mondon : nacioj, klasoj kaj eĉ seksoj reciproke depruntas iujn el aliaj vivmanieroj. La modo pli personiĝis. Ĉiu elektas sia(j)n modelo(j)n. Ŝajne ekzistas pli granda libero.

Sed, kiel jam dirite, ni devas resti observemaj, ĉar blinda obeo al modo estas subtila maniero rezigni nian "liberdevon kaj obeorajton"

Jean-Claude.

La kokosarbo

La Modo estas la kokosarbo* de nia socio. Ĝia funkcio estas ebligi novan generacion sin esprimi sendepende kaj sin dispartigi de la malnova.

Ĉiaj manieroj havas komunan punkton : Ili kolerigas la

gepatrojn kontraŭ la infanoj. Nur la rimedo ŝanĝiĝas.

Kvindekulo ŝajnas ŝati perforton : li surmetas nigran bluzon, "rulas" la ŝultrojn, abrupte sintenas kaj krude parolas. Por li, kompreneble, la aliaj ne estas veraj viroj.

Sesdekulo estas snoba, manierema. Li surmetas neriproĉeblan kostumon, kravaton, skvamajn okulvitrojn kaj portas "ataŝedkezon"** atestantan lian efikecon. Li spitas la antaŭan generacion, avaran, kretenan kaj nesciantan pri ekonomiaj realaĵoj.

Sepdekulo estas malpura longhara misvestita barbulo. Li spitas la konsumsacion, la militon, la aŭtomobilon, la modon. Por li, sesdekulo estas kapitalismemulo, manipulata de la ŝtatestraro, de la industrioj, ktp.

Okdekulo estas denove perfortema kaj similas al kvindekulo. Kiam oni vidas lin, oni timas por la monujo. Fakte, li ne estas pli perforta ol sepdekulo, sed nur li scias tion. Sufiĉas, ke li aspektas perfortema, por forpeli sepdekulon. Tio estas la celo.

Same, sepdekulo ne estas malpura. Li aspektas tia nur por sesdekulo, kiu ne plu volas frekventi lin. Por sepdekulo estas avantaĝo : Li ne bezonas multe labori, sin lukse vesti kaj akiri multekostan aŭtomobilon por ĉarmi belan virinon : Li bezonas nur allogi sin per filozofia pacema parolado, kaj krak! (***)

Konklude, ne utilas klopodi por sekvi la modon. Pli bone, atendu, ke ĝi reatingos vin !

Ĵansebo.


* Subtila aludo al malnova kutimo de iu malproksima tribo.

Ĝi grimpigis la gemaljunulojn sur kokosarbon, dum la

ceteraj skuis la arbon. Tio selektis la plej kapablajn pluvivi.

** valizeto por gravaj dokumentoj, speciale nekomforta en aŭtobuso.

*** neologismo. Ne troviĝas en la Fundamento.



L A F I N N A L I N G V O

Unu el la plej ekzotikaj lingvoj en Eŭropo sendube estas la finna (apud la hungara, estona, vaska...), kiu fore de ĉefaj trafikvojoj sukcesis konservi sian antikvan strukturon kaj multajn vortojn en tre origina formo pratempe prunteprenitajn el hindoeŭropaj lingvoj. Al tiu, kiu volas studi la historion de la hindoeŭropaj lingvoj, estas same grave konatiĝi kun la finna lingvo kiel kun la litova. La finna ja apartenas al la finnugra lingvo-familio, kiu siavice membras ĉe la ural-altaja grupo, eble havanta komunan devenon kun la hindoeŭropa pralingvo. Post la glacia epoko la finnugraj triboj forlasis sian hejmgregionon proksimume ĉe la Volga kurbiĝo kaj ekvagis post siaj ĉasaĵoj, iuj norden iuj okcidenten. La hungaroj - tiuj fajraj madjaroj - ekloĝis finfine en Panonio, la finnoj atingis iom post iom sian nunan teritorion ĉ. en la komenco de la kristana erao. Laŭ la medicinaj esploroj la hungaroj kaj la finnoj havas nenian sangoparencecon, nur la lingvan, ĉar la lingvo estas unu el la plej fortaj sociaj institucioj, kiu konserviĝas tra biologiaj ŝanĝiĝoj.

Kion Martin Luther faris por la germana lingvo, tion Mikael Agrikola, lia disĉiplo, faris por la finna lingvo, aperigante la unuan ABC-libron en 1542 kaj sian tradukon de la Nova Testamento en 1548. Mikael Agrikola "kreis" la finnan lingvon precipe surbaze de la okcidentaj dialektoj de la finna. Dum pluraj jarcentoj la finna restis nur la popola lingvo, kaj oni publikigis sole religiajn tekstojn. En la lasta jarcento ekpulis vigla nacia vivo, kaj post longaj kaj furiozaj spiritbataloj kontraŭ la superrego de la sveda lingvo, kiun la superaj socitavoloj uzis, la finna establiĝis kiel kultura lingvo.

Nuntempe la finnan lingvon parolas ĉ. 5 milionoj da homoj, ekster Finnlando precipe en Svedio, kie estas ĉ. 300 000 gastlaboristoj kaj kelkdek miloj da finnlingvaj aŭtoktonoj en norda Svedio, en Sovetunio, kie en Petrozavodsk aperas eĉ finnlingva ĵurnalo, kaj en Usono, Kanado, Aŭstralio troviĝas finnlingvaj kolonioj tamen rapide malaperantaj. Ĉiujare aperas preskaŭ 4000 librotitoloj kun

eldonkvanto de ĉ. 30 milionoj kaj 1500 gazetoj (revuoj, magazinoj, ĵurnaloj) estas eldonataj. La finna radio dissendas du paralelajn finnlingvajn programojn, same la televido, kie la eksterlandaj filmoj estas ne dublitaj, sed provizitaj per subtitoloj (finne tekstizitaj).

* *
*

Kion la ordinara eŭropano scias pri la finna lingvo, estas verŝajne, ke ĝi havas plurajn kazojn. Esperanto havas du kazojn, la finna havas 18 kazojn entute. Jen ilia kompleta listo, kompreneble kelkaj el ili estas tre maloftaj :

Nominativo :	talo = domo
akuzativo :	minut = min
genitivo :	miehen = de viro
esivo :	kissana = kiel kato
partitivo :	leipää = iom da pano, panon
translativo :	hiireksi = (ŝanĝiĝi) je muso, en muson
inesivo :	mökissä = en kabano
elativo :	hūoneesta = el ĉambro
ilativo :	lumeen = en neĝon
adesivo :	katolla = sur tegmento
ablativo :	rannalta = de (sur) strando
alativo :	koiralle = al hundo
abesivo :	vaimotta = sen edzino
instruktivo :	käsin = per manoj
komitativo :	vaimoineen = kun edzino(j), (dingularo = pluralo)
prolativo :	meritse = laŭ mara vojo
lativo :	kotia = hejmen
eksesivo :	kotoa = el hejmo

La kazaj fleksioj kelkfoje kaŭzas ŝanĝiĝojn en la vortradikoj, tiel ke oni devas aparte lerni la tutan paradigmon parkere. La finaĵo de la pluralo estas i (aŭ j), kiu lokiĝas inter la vortradiko kaj kazfinaĵo, en la nominativo ĝi tamen estas t. La adjektivo akordiĝas kun la substantivo, atribuite same kiel predikative. "Eräessä pienessä majassa" = en iu malgranda kabano, laŭvorte jene : iuen malgrandaen kabanoen, kaj la sama frazo en pluralo : eräissä pienissä majoissa.

Kiel objektan kazon Esperanto uzas la akuzativon, sed la finna uzas 4 kazojn : nominativo, genitivo, akuzativo

kaj partitivo, ekz. :

gen. hän luki kirjan = li ŝi legis libron
nom. lue kirja = legu libron
part. älä lue kiejas = ne legu libron
akuz. Poika näki minut = knabo vidis min.

Tio estas ĉiam stumbligilo por nedenskaj uzantoj de la lingvo.

La finna lingvo havas 4 modojn : indikativo, kondicionalo, subjunktivo kaj imperativo, ĉiuj estas tre komplikaj fleksiaĵoj. Por ne tro fortimigi la legantojn oni devas menciigi kelkajn avantaĝojn de la finna, nome fonetika ortografio kaj manko de genroj.

La verbo fleksiiĝas laŭ la personoj jene :

(Minä)teen = mi faras
(sinä)teen = vi faras
hän tekee = li/ŝi faras (la finna ne diferencigas inter ŝi kaj li)
me teemme
te teette
he tekevät

Kiam ni faras negacian frazon, kurioze, la verbo ne fleksiiĝas, sed la nea vorto estas fleksia.

Minä en tee
sinä et tee

hän ei tee ktp. (Cetere, la persona pronomo povas esti ellasata, ĉar la fleksiaj finaĵoj esprimas la personon).

Preskaŭ sian tutan vorttrezoron la finna prunteprenis en diversaj epokoj el la hindoeŭropaj lingvoj. Ni faru ian komparon : (tre malnovaj pruntoj)

Finne	sanskrite	latine	angle	esperante
nimi	naman	nomen	name	nomo
nenä	nasa	nasus	nose	nazo
sata	ŝata	centum	thousand*	cent (* dek cent)
rikas			rich	riĉa
rengas			ring	ringo
kuningas			king	(reĝo)
sama	sama		same	sama

Oni povas facile formi frazon, kiu plene respondas la respektivan esperantan, ekz. ruostainen sarana narisee = (la) rusta ĉarniro knaras ! (en la finna estas rimarkinde,

ke ĝi volonte forlasis malfacile prononceblajn sonkombinojn en la komenco de la vorto kaj ke ĉiujn ŝuŝajn sonojn ĝi simpligis nura so!). Same la demandaj kaj montraj pronomoj multe similas la esperantajn :

kuka	= kiu	tuo	= tio
mikä	= kio	tuossa	= tie
missä	= kie	tuonne	= tien
mihin	= kien	tuolloin	= tiam
milloin	= kiam		
miksi	= kial	ktp.	

Jam tre frue la finna lingvo komencis krei vortojn surbaze de siaj propraj vortfaraj principoj, ni prenu unu tipan serion da vortoj :

kirjoittaa	= skribi (ankaŭ verki)
kirja	= libro
kirje	= letero
kirjain	= litero
kirjallisuus	= literaturo
kirjailija	= verkisto
kirjuri	= skribisto
kirjasto	= biblioteko
kirjoitelma	= eseo, artikolo
kirjata	= registri (ekz. leteron)

Ĉu ili aspektas "artefaritaj" ? Tamen ili bonege funkcias kaj vivas en la popola buŝo same kiel en la literaturo.

Aliaj ekzemploj pri la vortfarado :

urheilu	= sporto (bravumado)
elokuva	= kino (vivbildo)
sähkö	= elektro (siblego, la fenomeno "elektro" plej orefrape aperas okaze de kurta cirkvito kiel siblega sono).
voimistelu	= gimnastiko (fortunado)
mainostaa	= reklami (menciindumi)

Kelkfoje la vortfarado indikas ion pri la mondkoncepto, ekz. :

maailma = teraero (mondo)

kompreneblas nin, ke por la prafinoj la mondo estis kombinaĵo de tero kaj aero. Aliflanke kiel prepozicion "sen" oni uzas la vorton "ilman", kio indikas, ke la aero estis konsiderata kiel "nenio" aŭ "manko"...

Per la finna lingvo oni kreis nemortemajn poeziaĵojn, precipe la popola poezio estis riĉa kaj sur tiu bazo E. Lönnrot kunmetis la epopeon Kalevala. Tiun artverkon redonis en Esperanto J.E. Leppäkoski, kies brilega traduko aperis 1964 post plurjardeka penado.

Oni diras, ke la plej bela frazo en la finna lingvo tekstas jene : "Aja hiljaa sillalla" (veturu malrapide sur la ponto)... La finna lingvo kontribuis malmulte al aliaj lingvoj, eble nur per la vorto "saŭno" (sauna), kiun vorton enkondukis multaj lingvoj. Same oni diras, ke la vorto "poika" (knabo) patras la svedan "pojke" kaj la anglan "boy". Ankaŭ rekordon de unuvortaj palindromoj havas la finna lingvo, nome "saippukauppias" (sapovendisto)...

S.P. Hurtt (Finnlando)

.....
La ĉi-posta teksto estas pripensaĵo de la rilatoj inter Esperanto kaj la lingvo internacia.

ALÉM DA HERESIA DO ESPERANTO

(Preter la pri-esperanta herezo)

Grava eraro de esperantisto estas konsideri siajn dezirojn kiel realaĵojn, aŭ se vi preferas, siajn kredojn kiel profetaĵojn. Alia same grava eraro estas pensi, ke tutlogike devas estonti en sufiĉe proksima futuro ununura internacia lingvo, kiam povus esti, jam estas kaj verŝajne estos pluraj. Do, kiuj ? Jam vi demandas...

Ĉu Esperanto ? Ja eblas, sed en futuro proporcia de la ridinde malmulta nombro da homoj, kiuj jam uzas ĝin... Min ŝtonumu, se mi pravas.

Vane estas nei la rolon, kiun ludas la angla lingvo kiel internacia komunikilo, kvankam tiun rolon ĝi tre malbone ludas... Nur utilas demandi : ĉu plu ĝi rolas tiel ?

Mi opinias, ke ne. Ĉar, krom la fakto, ke ĝi malfacile taŭgas por internacia uzado, ĝi okazigas pro sia hegemonieco malamikajn reagojn far ĉefe multhomaj etnoj, kiuj pli kaj pli kontraŭstaras per siaj propraj naciaj lingvoj (Ĉinio : 1000 milionoj, Hindio : 600, Indonezio : 150,

Bengalo : 80, arabaj landoj : 140, Brazilio : 130, Meksikio : 80, ktp...)

Probable, do, baldaŭ reduktiĝos la angla al angloidadaj landoj kaj parencaj (Usono, Kanado, Aŭstralio, Novzelando, Skandinavio...) t.e. inter 300 kaj 350 milionoj da homoj. Kaj dum tiu populacio malkreskos pro manko de naskoj, la lingvo iĝos pli kaj pli regiona kaj nacia.

El la ĉi-supre nomitaj lingvoj plej parolataj en la mondo, neniu ĝis nun rolas kiel internacia komunikiloj, ĉar ĉiuj ekzistas interne de unu aŭ kelkaj ŝtatoj : la rusa en Sovetunio, la ĉina en Ĉinio kaj lokaj ĉinaj komunumoj ĉie ajn en la mondo, la hinda en Hindio, la araba en arabaj landoj de Proksima Oriento kaj de Afriko.

Nur la latinidaj (hispana, portugala kaj franca) estas parolataj en tri aŭ eĉ kvar kontinentoj. En Afriko temas precipe pri koloniiga rolo.

Ankoraŭ tro fruas por diri, ĉu la grefto de la portugala kaj ĉefe de la franca en Afriko estos daŭra sukceso : la emancipiĝa movado de ~~Negrafriko~~ decidos pri tio...

Sed kio estas certa, tio estas ke en Latinameriko elmergiĝas vere internacia lingvo kaj kulturo, kiu rezultas el konverĝo de diversaj kulturoj (indiana, eŭropa kaj afrikdevena). Tiu internacia lingvo konkretiĝos per intermikso de la hispana kaj de la brazila lingvoj kaj ĝi povos influi kaj rekte efiki en ĉiuj ŝtatoj kaj regionoj, kie la ĉefa lingvo estas latindevena t.e. al 700 milionoj da homoj el : Meksikio, Gvatemalio, Salvadorio, Hondurio, Nikaragvo, Kostariko, Panamo, Ekvatorio, Kubo, Haitio, Dominikio, Gvadelupo, Martiniko, Gvajanio, Venezuelo, Kolombio, Peruo, Bolivio, Ĉilio, Paragvajo, Urugvajo, Brazilio, Francio, Belgio, Kebekio, Sankta Petro kaj Mikelono, Luiziano, Svisio, Portugalio, Akoro, Madejro, Galecio, Hispanio, Katalunio, Korsikio, Sardinio, Sicilio, Italio, Rumanio, Tunizio, Alĝerio, Maroko, Maŭritanio, Kanario, Kaboverdio, Senegalio, Gambio, Gvineo, Malio, Niĝerio, Gvineo Bisaua, Eburio, Alta Voltio, Togolando, Benino, Ĉadio, Centrafrika Resp., Kamerunio, Santomeo, Ekvatora Gvineo, Gabonio, Kongolo, Zairo, Angolo, Mozambiko, Malagasio, Komorio, Maŭricio, Reunio, Novkaledonio, Polinezio, Paskinsulo, Galapago, Makao, Timoro.

Tia lingvo koncernos tutan popolon kaj ne nur elitajn frakcion el la loĝantaro kiel tro ofte la angla kaj ... Esperanto. Ankaŭ estos kontraŭstaroj kaj baroj, sed ĉio

okazos siatempe, nur malhelpus la ideologiaj kvereloj kaj kontraŭdiroj.

Zé Brazinha
(alias Patriko)

MONDIALA INDIVIDUALISMO*

Pravigo de la ideoj de D-ro Proschowsky post sesdek-jara periodo, malgraŭ tiuj bonaj ideoj, ne efektiviĝis.

paĝo 8 - Nuligo de parazitismo estas grava faktoro por fondi justan socion, en kiu ekspluatado de hom' al homo ne plu ekzistas. Ĉar en la 60-jara periodo ni ne ekkonis la celon de antropa vivo, la fakto restis, ke la vivorajto por ĉiu estas egala, sekve ĉiu vivrimedo devas esti komuna posedaĵo de ĉiuj vivantoj.

paĝo 9 - D-ro Proschowsky trovis la socian mon-ekonomion falsa scienco, kaj tial li akceptis vere sciencan sociologion konstruovan. Ĉar D-ro Proschowsky opiniis, ke kritikado estas la bazo de ĉiu progreso en la homa kulturo, li esperis, ke tiu principo efektiviĝu.

paĝo 10 - Pri socia higieno, kiun li konis speciale, la Doktoro prave klarigis la diferencon. En justa socio helpo al malsanuloj ne estas komerca afero aŭ monavida profesio. Krome en justa socio klerigado al ĉiu individuo favoras al bonfarto de la tuta anaro. (Tiu klerigado - p.10/11 - precipe valoras por la homa selektado kaj demografio). Proschowsky difinis sian pozicion en socialaj teorioj kaj asertis, ke li celas kombini el la centralizismo tion, kio estas necesa kun tio, kio estas ebla el individuismo.

paĝo 12 - Pri manlaboro li konsideris, ke ĝi estas metodo al moral-eduko.

paĝoj 13/14 - Pri halto en la homa selektado eŭgenika li citis la momenton, kiam "riĉeco" fariĝis idealo strebata. Ankoraŭ nun post 60 jaroj tiu trivialiga influo de monaj konsideroj ekzistas. Dank'al tiu monserĉado (paĝo 15, legu "monavido") la kapitalismo ne jam estas detruata, ĉar nur kelkaj individuoj konscie sukcesis elimini la

* Komentoj pri la broŝureto de Félix Lagalaure "La individualisma socialismo de D-ro Axel Robertson Proschowsky" eldonita de SAT-Broŝurservo, 1982.

monserĉadon el sia vivsinteno. Ankaŭ mizerulo per sia monavido subtenas kapitalismon.

ALDONO mondial-individualisma (M.I.)

Atenta leginto povis rimarki, ke en M.I. vortoj estas evitataj pri kies signifoj ekzistas diferencaj difinoj, ĉar tiuj homonimoj fuŝas dialogon; kaj dialogo estas urĝe bezonata por solvi la problemojn, kiuj post 60-jara periodo ne jam estas solvitaj. Krome en tiu periodo ekestis novaj problemoj, kiuj postulas novan vojon por solvi ilin. Ekz. : "frustracio kaj skizofrenio" estas elementoj, kiuj ludas gravan rolon. La psikologia krizo eble ne ekzistis antaŭ 60 jaroj. Nun ĝi grave endanĝerigas la eblon al justa socio.

Ekologio, eluzo de energi-fontoj, polucio kaj terorismo estas aliaj ekzemploj nun en la jaro 1982a. Bedaŭrinde la termino (paĝo 11) "Individualisma Socialismo" estas ne-logika; ĝi similas al "nigra blanko" aŭ "blanka nigro". Tamen, malgraŭ ke ni bone povis kompreni kial D-ro Proschowsky elektis la terminon, ni prefere uzu la vortojn "Mondiala Individualismo", 1-e ĉar la homaro estas kolektiva esto de individuoj, 2-e ĉar la problemoj koncerne ĉiun individuon, la vorto "mondiala" estu esceptokaze uzata nur por indiki, ke temas absolute pri ĉiu antropo sur la planedo "TERO". Pensi mondiale signifas: malatenti ne unu individuon, eĉ ne sin mem aŭ ĵusnaskiĝintan infanon. Kiam ĉiuj homoj estas feliĉaj, tiam ankaŭ mi estas feliĉa, ĉar mi apartenas al la homaro komplete; 3-e ĉar montriĝis, ke individualismo estas alte taksata, mondiala individualismo signifas la respekton al ĉiu individuo; 4-e ĉar la nure bona disciplino estas mem-disciplino, de individuo, kiu akceptas plenan respondecon pri siaj agoj; 5-e ĉar la opinio, ke por sin-eduko al mondiala individualismo 5 jaroj sufiĉas, 1987 estas PRIMO (entjero ne dividebla, same kiel individuo). En tiu jaro ni feste inaŭguru mondialan individualismon.

Ek al laboro !

La programo estas simpla sineduko kaj aplikado de tiu edukigo:

Libroj en la angla lingvo aperis:

en 1963 Projekto por estonteco, aŭtoro Dennis GABOR,

en 1972 Alternativo morgaŭa, aŭtoro G.R. TAYLOR.

en 1980 Ĉiel-alte, aŭtoro W.W. DYER.

Modernaj sciencistoj. Gabor skizis estontan tempon ĝene-

ralan. Taylor direktis sin al la morgaŭo. Dyer diris : Ne morgaŭ, sed NUN ! M.I. emfazas : Je la limo inter onta kaj inta tempoj, kiu limo laŭ kvara dimensio pasas en ĉiu hodiaŭo. Ĉiu tago komenciĝas per 24 horoj da futuro kaj finiĝas per 24 da pasinteco.

iea-iu

La homo havas ununuran originon,
kia ajn estas ĝia raso

Estas nova respondeco tion sciigi, kun ĉiuj konsekvencoj, kiujn tia deklaro sekvigas : ĉiuj homoj estas fratoj (70 miliardoj da individuoj en 200 000 generacioj), ĉiuj havas la saman historian pezon ; ne estas primitivuloj kaj evoluintoj, sed malsamaj kulturoj adaptitaj al malsamaj medioj.

P-ro Yves Coppens
(Sciences & Avenir, speciala eldono n°38)

Ekirinte esplori la simplon, la scienco
trafis la kompleksan.

... Pripensu pri la ekologio ! Tiu biologia disciplino, kiu estas la scienco pri eko-sistemoj, reduktis al nenio la malnovan ideon, laŭ kiu oni povas kompreni estaĵon, izolante ĝin for de ĝia natura medio. Estaĵo estas neapartigebla de sia medio, kaj ĝi estas de tipo kompleksa. La prikompleksecan problemon naskas la scienca esploro mem.

Edgar Morin
(Sciences & Avenir, nov. 1982)

N A S R U D I N

Analfabeto petis Nasrudinon skribi leteron.

- "Mi ne povas", la majstro diris, "ĉar mi brulvundis la piedon".
- "Ĉu tio malhelpas vin skribi leteron ?"
- "Ĉar neniu povas legi mian manskribon, mi devus ien vojaĝi por interpreti la leteron. Kaj la piedo doloras : do pli bone ne skribi, ĉu ne ?"

Kris Long.

VOJAĜO AL TUNIZIO

Kiel pensiita konstrulaboristo mi restadis 15 tagojn en Tunizio. Ni eliris la 23an de novembro el Klermonto (Clermont) kaj post du horoj ni alteriĝis en Monastir. La restadejo estis proksima de la flugkampoj, ĉe la marbordo. Ĝi konsistas el tri domoj por ĉiuj servoj : manĝejoj, administrejo, ludejo, ktp, kaj multaj domoj por du personoj. Ĉe la marbordo estas bela strando ; inter la domoj kreskas mediteraneaj vegetaĵoj, ĉefe palmarboj. La tunizianoj estis sufiĉe ĝentilaj. Norde ni vizitis Tunizon, Kartagon. Antaŭ Tunizo ni vidis vitkampojn. Sude ni iris ĝis Matmata, kie ni vidis trogloditajn kavernojn, poste la insulon Ĝerba. Rimarkindaj estis la olivarbaroj ĉirkaŭ Sfaks kaj Zarziz, sed ankaŭ grandaj areoj, kie kreskas nur kelkaj arboj aŭ nenio (ŝotoj). Tie paŝtiĝis malmultaj ŝafoj aŭ azenetoj.

Kion opinii pri tiu lando ? La novaj kvartaloj de la grandaj urboj aspektas kiel ĉie en la mondo. La malnovajn (medina) ni vizitis, ĉefe la bazarojn (sukoj). Tie laboras metiistoj, kiuj produktas belajn juvelojn, ledaĵojn, tapiŝojn, korboplektaĵojn. Estas multe da vendistoj. En muzeoj kiel Bardo estas belaj mozaikoj, skulptaĵoj. La kartagaj ruinoj kaj amfiteatro El Djem memorigas pri la historio kaj montras, ke ili estis jam konstruopablaj. Tunizio estis ofte loko, kie alfrontiĝis potencoj : kartaganoj, romanoj, vandaloj, kristanoj, bizancanoj, araboj, Karlo la kvina, turkoj, francoj. La unuaj loĝantoj estis la numidoj.

Tunizio estas respubliko, sed fakte regas H. Burgiba, dumviva prezidento kaj ankaŭ lia partio Destur. Tamen estas parlamento elektita per ĝenerala voĉdonado. Opozicio estas libera, sed, mi kredas, malfacila. Tamen ni povas nin demandi, ĉu tiu stabila povo ne estas necesa por tiuj disvolviĝantaj landoj. Multo dependas de tiu, kiu estas tutpova. En Tunizio, islama lando, certe estas malfacile ŝanĝi la kutimojn. Tamen nun ĝi estas pli libera por la virinoj. Ili ne plu devige surmetas vualon, havas rajton voĉdoni, kandidati. Sed fakte la viroj ĉiam strekas la nomon de la virinaj kandidatoj. Problemo estas la kreskanta demografio. Pli ol 50 procentoj el la loĝantaro aĝas malpli ol dudek jarojn. La registaro permesas kontraŭkonci-

pon kaj liberan ĉesigon de gravedeco, sed la religia kaj kutima mensostato malefikas tiun permeson. Ankaŭ oni limigas je unu edzino por ĉiu. Por efektiviĝi reformojn necesas forta povo. Mi opinias, ke la nuna povo agis laŭ tio ebla. Tunizio estas la unua inter la islamaj landoj dank'al tiu evoluo.

Por la estonteco estas grava ekonomia problemo. Tio estas, ke oni ne povos kreskigi la produktadon tiel multe kiel la loĝantaro kreskas. La ĉefaj riĉaĵoj estas la petrolo (malmulta kaj baldaŭ elĉerpota), fosfato, olivoleo, turismo. La agrokulturo ne produktas sufiĉe kaj oni importas la duonon de la necesaj grenoj. La fiŝkaptado estas eta kaj la italaj fiŝistoj konkure venas ĝis apud la tunizaj marbordoj. Kiel industrio estas la kemia purigado de fosfato, rafinado de petrolo, tapiŝaj fabrikoj, potaĵoj, mozaiko, produktaĵoj de la metiistoj, uzinoj por aŭto-muntado. Por financi la investadon la mono venas el Usono aŭ arabaj landoj, do estas ĉiam pli da fremda ŝuldo. Por la laboristoj estas socia asekuro kaj por la aliaj sociaj kategorioj, sed nenio por la senlaboruloj. Laŭ oficiala taksado ili estas pli ol 300 000 sed verŝajne multe pli. Ĉiujare la duono de la junuloj, kiuj aĝas por labori, ne trovas dungistojn. Oni pli bone instruas la junulojn, sed poste ili ne plu volas vivi en mizera kamparo kiel la gepatroj. Ankaŭ tio ampleksigas la urban senlaborecon. Kelkaj fariĝas deliktuloj, jen alia problemo.

Tio pripensigas nin, kiuj deziras tutmondan unuiĝon. Por mi ŝajnas, ke tiu idealo estas vere malfacile atingebla. Ĝi estiĝas el la stato de la industriaj landoj, konsidere al ties granda produktokapablo kaj abundo de vivrimedoj. Ĉu oni povas esperi por ĉiuj landoj tiel grandan disvolviĝon? Certe la moderna produkttekniko esperigas plibonigon. Estos dezirindaj politikaj povoj, kiuj evoluigos la materiajn kondiĉojn kaj mensostatojn kaj pli bonan internacian kunlaboradon. Necesos ankaŭ limigi la naskiĝojn. La danĝero estas la venko de fanatikaj naciistoj aŭ religiuloj, kiuj direktos la malammon de la popolo kontraŭ aliajn popolojn. Mi ne opinias same kiel la abundistoj, ke oni produktos tiel grandkvante por kontentigi ĉiujn dezirojn, sed male, necesos limigi la konsumadon aŭ malŝparon en disvolviĝintaj landoj por pli da solidaro al la disvolviĝantaj.

La sennaciisma socio ŝajnas malproksima. Por la nuna momento ni devas elekti la tendencon, kiu povas esperigi evoluon al tiu celo kaj ĝin helpi. Ĝis nun la socialismo estis por subteni la laboristajn depostulojn, sed nun ĝi devos pli kaj pli serĉi kiamaniere organizi la produktadon kaj interŝanĝojn por pli bone kaj pli egalece kontentigi la homajn bezonojn. En disvolviĝantaj landoj necesas helpi tiujn, kiuj laboras por tiu celo.

En Tunizio eble per grundkorektado oni povas doni al agrokulturo nun sterilajn grundojn. Ĉu ankaŭ ne eblas utiligi la sunenergion por ekzemple sensaligi la markvon kaj ĝin uzi por irigacii? Laŭ mi la malkoloniado estis justa. Tiuj landoj nun disvolviĝu kaj partoprenu en internacia organizado kaj kunlaborado. Amikecon al tiuj, kiuj agas en tiu direkto!

O.P.

E ŭ r o p a s t a t u t o
por la konscienc-obĵetantoj*

La 7an de februaro 1983, la eŭropa Parlamento adoptis per 111 voĉoj kontraŭ 15 kaj 7 sindetenoj rezolucion prezentitan de la itala socialista depututino Maria-Antionetta Macciocchi kaj subtenitan interalie de la franca eksministro Simone Weil, kiu estis la unua prezidantino de la Parlamento (kaj kiu estas, rimarkinde, de dekstra tendenco).

La Asembleo petas la dek regnojn harmoniigi siajn leĝarojn, kaj agnoski, ke la anstataŭa civilservo ne devus esti rigardata kiel punsankcio, nek superi la daŭron de la ordinara militista servo. Tio kontraŭas ĉiujn leĝarojn de la landoj kun deviga militservo: ekzemple en Grekio 48 monatoj anstataŭ 26, en Francio 24 monatoj anstataŭ 12.

Simpla deklaro sufiĉu por havigi tiun statuton.

Nun la parolvico apartenas al la eŭropaj naciaj registaroj, speciale al la greka kaj al la franca socialistaj registaroj: ĉu tiuj "maldekstruloj" restos pli reakciaj ol S-ino Simone Weil?

Valo.

* konscienc-obĵetantoj: tiuj, kiuj rifuzas la militistan servon pro konsciencaj motivoj (religiaj, filozofiaj, ktp.)

HIMNO PRI ESPERANTIO.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

Ha, kiel mildus Vivo
En Mond' Esperantia!
Fariĝus efektivo
La sankta sento ĝia.
Ĝi estus land' sen limo,
En kiu, sen angoroj,
Liberus la animo
Kaj fontus Pac' el koroj.

Mi vin apartenadus,
Lingvio Hompatria,
Kaj ĉiam fieradus
Infano esti via.
Sin ligus mia sorto
Al via sort' konfide,
Kuniĝus mia forto
Al via memdecide.

Aspektus, Esperanto,
Mirinde via Vojo,
Vi iĝus Vivkonstanto,
Subtenus vin amĝojo.
Kreskante kun prospero,
En virto humaneca,
Atestus vi pri Vero,
Pri digno plej Homeca.

Jen estas via celo,
Brilanta trans la nokto,
Gvidanta fora stelo,
Lumsigno de la dokto :
Dissendi plu, ĉiame,
Klarecon, nobla revo,
Misie iĝis, flame,
Unika via Devo.

Ha, kiel Vivo mildus
En Mond' Esperantia!
Socio ne plu hidus
En Patrinsino ĝia.
Min gvidu, rava celo,
Ĝis mia lasta tago,
Al l'Esperantihelo,
Sub ruĝa la SAT-flago!

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

En Eymet 1983/04/29.

B.G.D.

EN FRANCIO



SUB SOCIALISTA REGADO

"Necesas, ke oni alvenu al la armeo preparite, kaj preparite de la lernejo, la liceo kaj la universitato. Necesas simbiozo kun la nacia edukado."

Charles Hernu
ministro pri nacia defendo
(Le Monde, 81 07 11)

Por tiu celo, interkonsenta protokolo estis subskribita la 23an de septembro 1982 inter la ministro de la Defendo kaj tiu de la Nacia Edukado.

Tiu protokolo anoncas interalie "la kreadon de regulaj interrilatoj" inter la armeo kaj la lernejo, inkluzive per "senpera kontakto kun la militistoj"... "agadojn ebligantajn al la lernantoj, en la kadro de edukaj aktivecoj,

ricevi senperan informadon en la armeaj centroj, pri la vivo de la armeoj, aŭ kontakti kun la militistoj"... "plibonigi la informadon de la junuloj kaj junulinoj pri la necesoj de la nacidefendo kaj la celado de la nacia servo" (Ekstraktoj el la oficiala teksto).

Fakte oni celas, per penetrado de la armeo en la lernejojn, ilin transformi en antaŭĉambrojn de la kazernoj.

Por pliperfektigi la celpreparadon de la infanoj kaj lernantoj, estis kreita miksa komisiono konsistanta el reprezentantoj de la Defenda kaj de la Eduka ministerioj "POR KE ONI ĈESU VIDU, EN CERTAJ LERNOLIBROJ, SKANDALE KONTRAŭMILITISTAJN TEKSTEROJN" (Charles Hernu, le Monde, majo 1982). Ĉio estas preta por forgumi tutajn partojn de nia historio, cenzuri aŭtorojn aŭ eligi ilin el la programoj, kaj tiel konstrui edukadon sub ordonoj de la armeo.

La grandaj manovroj estas startitaj por transformi la instruistojn en monitorojn por aberacia militista preparado kaj la infanojn, ekde ilia plej juna aĝo, en bonajn obeemajn soldatetojn, estontan karnon por kanonoj.

Kia simbiozo povas ekzisti inter la militista institucio, kies celo estas ricevi de la individuo lian demision kiel homo kaj lian blindan obeadon, kaj la lernejo, kies rolo estas, male, favori la aŭtonomion kaj la homan respondecon, vekante la kritikan spiriton ?

Ni vokas ĉiujn GEPATROJN, INSTRUISTOJN, LERNANTOJN kuniĝi kun ni por :

- * SENKONDIĈE ABOLICIIGI LA INTERKONSENTAN PROTOKOLON HERNU-SAVARY
- * HALTIGI LA MILITISTIGON DE LA INFANECO KAJ DE LA INSTRUADO
- * KONSTRUI VERAN PEDAGOGION DE PACO KAJ INTERPOPOLA AMIKECO.

Subskribis 22 organizoj, inter ili la Pacista Frakcio de SAT.

el la franca tradukis Valo.

"Malsupre estas ŝtelisto", la edzino diris al Nasrudin unu nokton.

"Do silentu", li flustris, "se li trovos ion, li mem portis ĝin ĉi tien. Kaj eble li postlasos ion."

Kris Long.

Estetaj kategorioj de esp-a proleta poezio

Retenante al ni la rajton detale lumigi en ia skriba disputo la staton kaj lokon de esperanta proleta poezio, en ĉi tiu artikolo ni prezentas nur amasegajn pensojn pri la deveno de esperanta proleta poezio, ĝia evoluo, ĝia rolo en la esperanto-mondo, speciale inter laboristoj-esperantistoj, plue ĉu ĝi, laŭ sia enhava formo prezentas arton, aŭ estas unu el rimedoj de klasbatalaj pensoj de laboristara klaso, pli bone dirite, de esperantistoj-laboristoj. Fine, kia estas ĝia tasko, kia estas fina perspektivo kaj kia estas ĝia loko en la monda laboristara poezio.

Estas sendube konstatite, ke civila-burĝa poezio estiĝis samtempe kun la sama apero de la lingvo esperanto. La kreinto de la lingvo esperanto doktoro Zamenhof, presiginte sian unuan esperantlingvan lernolibron en la j. 1887, prezentis ankaŭ siajn unuajn poetajn kontribuojn. Do li prezentigis en la mondo samtempe kiel kreinto de sia lingvo kaj kiel poeto sur tiu lingvo. Same oni povus diri por la esperanta laborista movado. La movado kreiĝinta en la sino kaj en la kadro de iam elkonstruita esperantlingva movado elluligis ankaŭ sian proletan poezion. Vere, estas diskuteble, ĉu D-ro Zamenhof, kiu efektive pruvis, ke la lingvo, kiun li kreis kaj al la homaro donacis, estas unu perfekta koncepto, ĝis la hodiaŭaj tagoj nesuperebla, - estis poeto, en la vera senco de tiu ĉi vorto, talenta poeto, poeto artista. Estas literaturaj kritikistoj, kiuj tion neas kaj konsideras, ke li kun siaj poemoj nur antaŭvertis tian eblecon. Al tia opinio ili ankaŭ aldonas la fakton, ke Zamenhof havis malmultan kvanton da poemoj de diversaj enhavoj. Sed por la kriterio rilate kvaliton de poeto neniam oni devas uzi la kvanton da verkoj de koncerna poeto. Tion pruvas la ekzempleroj el la monda paralela literaturo, en kiu oni vidas kiuj mezuriloj estis konsiderataj por alte rangi ian poeton, en kiuj neniam estis enombritaj kvantoj. Spite, ofte estis rangitaj iuj, kies literatura verko ŝajnis kvante tre malriĉa. Ĉiuj liaj poemoj laŭ siaj konceptoj estas tre liberaj, tamen oni ne povas ilin enombri en la vico de proleta poezio, sed nur kiel esperanta civila poezion, liberale verkitan.

La apero de esperanta laborista movado estis tre klare konturita en la jaro 1921 en Praha, dum la kutimigita kazo de la jara universala kongreso, kiam la laboristoj, esperantistoj, en la sama tempo, sin apartigis kaj okazigis sian unuan esperantan laboristan kongreson. Iniciatinto de tiu ideo estis manlabora esperantisto Eŭgeno Lanti. Oni devus lin konsideri kiel fondintonde laborista movado en esperanta mondo kaj kiel unuan teoriiston kaj verkiston pri la esperanta laborista movado pro la verkoj "For la neŭtralismon!", "Laborista esperantismo", "Manifesto de Sennaciistoj", verkoj signitaj ĝis la hodiaŭaj tagoj kaj ankaŭ hodiaŭ kiel ĉefaj verkoj pri esperanta laborista movado, krom liaj leteroj familiare skribitaj, sed kiuj entenas ankaŭ programajn kaj principajn teniĝojn de Sennaciismo, kaj pliaj artikoloj kaj traktatoj kiel "Naciismo", ktp, ktp. Lanti neniam sin okupis pri poezio aktive, kiel ekzemple doktoro Zamenhof. Oni povas diri, ke en liaj verkoj oni povas trovi fasketon da pensoj pri literaturo de proletoj kaj nenion plu. Ekzemple, en sia letero 59a, p. 255 de "Leteroj de E. Lanti", Lanti skribis : "...sennaciista verkisto devas sennaciece produkti : li ne verkos en sia gepatra lingvo, sed en esperanto kaj pritraktos temojn, kiuj havas intereson por tutmonda publiko kaj ne nur por siaj samregnanoj aŭ samprovincanoj. Sennacieca ĉefverko estos tiu, kiun povas ŝati, ĝui, admiri homoj el ĉiuj mondpartoj." En letero oka, p. 55 : "Esperanto ne venkos per komercistoj kaj turistoj. Tiu kampo jam estas okupita de la angla lingvo. Esperanto sin trudos per sia literaturo, kiam troviĝos geniaj homoj, kiuj, ensuĉinte la esencon de l'Zamenhofa iniciataĵo, verkos sennaciece por tutmonda publiko. Kaj pro tiu konsidero ankaŭ oni devas ekkrii : For la idismon, ĉar la aŭtoroj de tiu abortaĵo ne volis, ke artefarita lingvo estu literatureca". Aŭ letero 9a, p. 57 : "Esperanto estas mia hejma lingvo, per ĝi mi ĝenerale esprimas miajn pensojn pli facile ol per la franca lingvo. Kaj tia konstato naskis ĉe mi la esperon, ke estonte pli kaj pli da homoj akiros la saman sperton. Se inter ili troviĝos geniaj verkistoj - kiaj ankoraŭ ne ekzistas en nia movado - tiam nia lingvo ricevos nedetruieblan fundamenton, sur kiu elkreskos mondliteraturo...". De tiu, laŭ tiu koncepto de konjektoj, oni ne povus diri, ke de la "pinto", de fondinto de la movado estis donita la iniciato por la kreado de proleta poezio, ankaŭ nenia signa-

lo. Ĝi aperis spontane tuj post la formigo de laborista movado kaj paralele kun komenco de aktiva klasa batalo. Do, ĝi ne estas per si mem avangarda en la senco de ia antaŭposteno, de ia antaŭirado, sed ĝi estas avangarda en la senco de plej bona, de plej fortika remparo de defendo de rajtoj de laborista klaso, tre mallarĝe ligita kun la apero de klasbatalo. Vere, ankaŭ civila-burĝa esperanta poezio flegis en la stadio de kontraŭstaro al faŝismo la spiriton de liberpensemo kaj liberalismo, sed tamen oni ne povus ĉi tie diri pri la estiĝo de ia proleta poezio en la strikta senco de tiu vorto. Ĉar mankis ĉefaj elementoj por tio : klaskonscio, klasbatalo, ktp, ktp. Tio estis nur la poezio de libereco, sed ne proletismo. El tio eliras, ke esperanta proleta poezio ne havis nur kiel sian celon malferman revolucian batalon. Ĝia celo ne estis realigita kun fino de revolucia batalo. Ĝi ne estos plu senbezona, sufiĉa. Spite, ĝi tiam venas ĝis sia plena esprimo, liberigita de katenoj de civila, burĝa societo, en kiu ĝi aperis kiel batalo kontraŭ dungata laboro kaj nun kiel ŝanco por emancipigo, memliberigo de laboristara klaso, memkonscio de klaso, kiel kontribuo de konstituigo de klas-konscio proletara, kiel alispeca kulturo, pli bone dirite, kiel subkulturo, sed neniel kiel kontraŭkulturo. En la civila socio ĝi evoluis depende de grado de la aktiveco de klasbatalo, nun ĝi evoluas sendepende, ricevas ĉiam kaj ĉiam pli fortikan koloron de estetaj kategorioj de proleta poezio, ĝi aspiras esti la vera arto, la integra arto kun ĉiuj ingrediencoj, kiuj eliras el la kontrakto de klasbatalo. Tio estos la postbatala etapo. Tezoj por tiu kategorio estus : flegado al la arta beleco, spirita transformiĝo de laboristoj, arta formigo de temoj, la havo de propraj formoj, kiuj estos esence diferencaj de ortodoksaj, tradiciaj formoj de civila, burĝa poezio, la esprimo de socialisma, poezia kulturo, la enhavo devas havi sian specifan karakterizon, kies fonto estas en la klasbatalo, en klaskonscio. Akcepti la cititajn tezojn tutece signifos atingi la plej altan pinton, nivelon de proletkulturo en la regiono de proleta poezio.

En la fluo de sia evoluo, la proleta poezio montris rudimentojn de karakterizoj de proleta poezio, kiujn ni supre citis. Ĝi tie ni citas kelkajn poetojn laŭ la alfabeto el ĉiuj partoj de la tera globo, kiuj bruliĝis aŭ bruliĝas sur tiu ĉi laboro. Ekster ili ekzistas ankoraŭ valoraj no-

moj, kiujn ni ne povis ĉi tie citi pro la manko de spaco. Ili estas : Baranyai Emeriko-Emba, Burger Josef-Kastelano, Barthelmess Norbert, Deij Lodewijk Cornelis, Dimitrijeviĉ Russchitty, doktoro Dragan, Ermanno Mello, Grigorov Asen pseŭdonimo Marin Ljubin, Göransson Egon, Heiderer Franco, Ĥrima M.Ĥ., Jakubcova Milda, Matkovsky Eŭgeniusz, Maŭra Georgo, Mihalski Eŭgeno, Murgin Canko, Nekrasov Aleksandroviĉ Vladimir, Scoor van Jan, Stefanoĉiĉ doktoro Jakob, Jim Hornö, ktp, ktp.

Diversaj estas la vojoj kaj praktikoj de moderna socialismo kaj tio ankaŭ trovis sian reflektan en la proleta poezio. Inter la cititaj nomoj kaj ankaŭ aliaj, kiuj laboras sur la pozicioj de esperanta proleta poezio, oni trovas tiujn, kiuj konfesas leninismen, maŭsismen, lantiismen, ktp, ktp. Diferencoj kaj specifikoj estas nur la esprimoj de tiuj diversaj vojoj kaj tio ne baras ĉiujn ilin vicigadi en la proleta familio. Spite, tio nur dokumentas kiel estas granda tiu ideo, por kiu ili ĉiuj batalas sub la nomo "Proletaro" sen konsidero al diferencoj kiuj inter ili ekzistas. La batalo por la plej larĝa socia akcepto de vera poezia kaj arta valoro eniris iam en sia lasta kaj fina fazo. Ĝi estas gajnita. Ĝi estas efektiva en procento cent. En novaj kondiĉoj ĝi ne estos kaj ĝi ne restos kiel la libro kun sep stampiloj.

Estas nur demando, ĉu ĝi estas kaj en kia grado sennaciisma poezio kaj literaturo, kaj en kia grado estas cititaj poetoj sennaciismaj poetoj. Al tiu problemo Lanti donis sufiĉe da spaco en sia verko "Leteroj de E.Lanti", Letero 8, p.55, letero 9, p. 57, letero 52, p. 217 kaj letero 59, p. 255. Sennaciisma literaturo povas ekzisti nur, se ĝi staras sur la sekvantaj principoj : laŭ plane da vidpunkto, ĝin faru nur sennaciistoj esperantistoj, kiuj posedas la ilon por akiri menson de mondĉivitanoj kaj kiuj donas al la homaro sennaciecan menson necesan por la ekzisto de sennaciisma literaturo. Literaturistoj devas esti geniaj verkistoj. Bedaŭrinde, inter la cititaj ĝis nun ekzistas neniam.

D-ro Dragan Dimitrijeviĉ Russchitty.

Nenion domaĝos al vi, kompatindaj legantoj, la ŝvitema red. de L! Jen nun daŭrigo de la felietono "Kiel ĝi (L!) naskiĝas" (unua parto en n-ro 47). Ek! Red.

Kiel ĝi naskiĝas

Leginte la unuan parton de tiu ĉi nia nova felietono, S-ro LM (Rotterdam) esprimis jene sian vidpunkton :

"Kun aparta intereso mi legas la artikolon pri la 'naskiĝo' de (ĉiu aparta kajero de) Laŭte! Mi esperas, ke vi bonvolos akcepti kelkajn komentojn.

Unue : mi ne ŝatas la esprimon "ofsetplako", sed multe preferas anstataŭ ĝi la esprimon "preslameno". Mi ne estas fakulo pri ofsettekniko, kaj do ne povas diri kun aŭtoritato, ke via esprimo estas erara, sed almenaŭ komencantoj, kiuj irus kontroli la esprimon en Plena Vortaro, eble estus mistifikitaj per la tie troviĝanta klarigo.

Due : vi aludas al la ebleco prepari sur ordinara blanka folio la titolojn kaj desegnaĵojn, sed poste klarigas, ke vi devas tajpskribi la tekston sur la preslameno mem. Nu, kiam antaŭ iom da tempo, mi okupiĝis pri preparado de bul-teno ofsetpresata, mi trovis, ke la fotadaparato tute bone pretis akcepti tajpskribadon egale kun aŭ sen desegnaĵoj. Malfacilaĵoj aperis kiam mi provis uzi ordinarajn fotograf- aĵojn, sed nigra-inkaj desegnaĵoj, kaj titoloj el glulite- roj, estis tre bone traktitaj. Ĉu vi skribis tiel pro pro- praj malsukcesaj spertoj ?

Trie : mi volas aludi al viaj problemoj dum kontrolado de lingvaĵoj, kaj mi volas, denove, ke miaj konsiloj donu hel- pon al vi. Vi aludas sufiĉe ofte al la sinteno de Laŭte!, kiu certe ne volas iel cenzuri la opiniojn de verkantoj, kaj mi laŭdas tiun sintenon. Mi sentas, ke pro tiu via sin- teno, vi tre malvolonte rifuzus proponitan artikolon, eĉ se la lingvaĵo de ĝi postulus de vi 'longan cerbumadon'. Mi konsilas, ke, foje, certe estus avantaĝe 'peti klarigojn de la verkinto', malgraŭ la elspezoj kaj tempo-perdo.

Pensu pri tio ĉi, ke, se vi estus petinta klarigojn kaj plibonigojn de via kontribuinto, P.M.-G. en L! 46, vi es- tus ŝparinta preskaŭ tutan paĝon. En ĉiuj el la tri eroj sur tiu paĝo troviĝas absolute nekomprenebla kunmetado de bonaj vortoj, nekomprenebla almenaŭ al ne-franclingvano. (Mi supozas, ke P.M.-G., estas franco aŭ francino.) Re-sen- do de la manuskripto, (do, ne simpla peto de klarigo), al la verkinto certe aŭ donus pli bonan lingvo-uzadon, se tiu

persono havas ion por diri, (kion mi mem tre dubas!), aŭ certigus, ke la koncernaj manuskriptoj neniam bezonus la laboron de tajpado, kaj tiel plu, kiu nun minacas, (pro pligrandiĝanta abonantaro), la ekziston de Laŭte! Kaj la tuto certe ne estus ia formo de cenzurado, sed nur tio, ke oni devas sekvi interkonsentitan regularon dum uzado de la internacia lingvo. Via kontribuanto P.M.-G. certe ne sekvis iun regularon dum ŝili verkis la tri-linian noton pri broŝuroj, ekzemple! (Parenteze, mi volas ekscii, ĉu vi komprenas tiun noton?)"

La red. laŭpove respondas :

1° - Kvankam la de mi uzataj ofsetplatoj estas ĝis nun nur el speciale traktita papero (ekzistas pli multekostaj el fortika papero, kaj aliaj, ankoraŭ pli multekostaj el aluminio, kiujn oni povas pli sukcese konservi por reuzado), mi volonte konfesas, ke ankaŭ min ne tute kontentigas la vorto 'ofsetplako', kaj ke 'preslameno' povas same taŭgi por mi, se ĝi estas same, aŭ espereble pli, komprenebla. Fakuloj instruu min, mi estas bonvola lernanto.

2° - Jes, mi havis ne tre sukcesajn spertojn, fotante tute tajpe preparitajn foliojn. (Vd. ekzemple L! n-ron 43, p. 2/16). Mi ŝanĝis la procedon por L! n-ro 44 kaj sekvantaj, sed mi tamen opinias, ke S-ro LM pravus. Verŝajne ekzistas rimedo por eviti la malnetan fotadon, kaj mi ne malesperas malkovri ĝin, kiam mi estos pli bone familiariginta kun la fotilo.

3° - Mian redakto-sintenon gvidas pluraj, ĝenerale laŭdataj principoj, kiujn mi ne povas bone difini, inter ili la "malcenzuremo", pri kiu mi ja ofte aludas, kaj ankaŭ mia propra "personeco", miksaĵo el pigremo, elturniĝemo (ĉi-lastata serve al la unua), kaj eble psikologiaj observoj al miaj propraj reagoj al alispecaj redaktomanieroj. Mankoj, mallertaĵoj, konfuzoj ne hirtigas miajn restantajn harojn de redaktanto. Mi atentus pli la ĉefajn gramatikajn regulojn, ol la stilon kaj la vortuzadon de la verkantaro. Laŭte! ja ne estas belliteratura, kaj mi ne kapablas ĝin fari tia. Ĝi estas uzebla de ĉiu ajn abonanto, eĉ, kaj eble ĉefe, de tiu, kiu ne aŭdacus verki por bele presitaj, multekostaj "revuoj", kie plagas eminentaj tre seriozaj esperantlingvuloj, kies lingva genio bedaŭrinde fortimigas la ordinarajn homojn. La sukceso de L!

(fino p. 29)



VORTOJ DE MALJUNULO

valo

OPTIMISMO ?

Mi aŭdis per radio S-ron Alain Decaux. Li estas fama historiisto, membro de la Franca Akademio, tre talenta rakontisto. Li diris : "Mi estas optimisto : ĉar en la daŭro de la historio la homo travivis multajn katastrofojn, kaj ĉiufoje sin elsavis."

La homo ? Ŝajne temas pri iu abstrakta estaĵo. Sed konkrete, kiuj homoj ?

Mi pensas pri la junaj viroj, francaj kaj germanaj, kiuj falis ĉe Verduno en 1916 ; pri la judoj kaj ciganoj gasumitaj kaj cindrigitaj en Aŭŝvico ; pri la ambaŭseksaj kaj ĉiuagaj homoj premigitaj sub la usonaj bomboj en Dresdeno ; pri la viktimoj de la atombombo en Hiroŝimo ; pri la bruligitoj per napalmo en Vjetnamio ; pri la amasbuĉitoj en Kamboĝio ; pri la masakritoj en Sabra ; pri la milionoj da infanoj, kiuj mortas pro malsano en la Tria Mondo.

Ne, vere mi ne povas konsenti pri la optimismo de S-ro Decaux. Mi diras pesimiste : se la homoj ne ŝanĝiĝos, se ili plu fidados la miton de "nacidefendo" kaj la militistan sistemon, kaj kredos, ke la senlaboreco ne estas solvebla sen amasa fabrikado de mortigiloj, ili daŭre spertos nenaturajn katastrofojn, ili pli kaj pli multope pereos en ili, ĝis eble la lasta katastrofego, en kiu pereos la tuta homaro.

Ĉu do restas ia eblo pri optimismo ? Mi vidas nur unu, nome : se la klarvidaj homoj, la pacamantoj, la homaranoj, kiel diris Zamenhof, sukcesos konvinki siajn samtempulojn.

Ho ve! ĝis nun ĉi tiuj restas aŭ indiferentaj aŭ nekompreneblaj. Malgraŭ la instruoj de la historio, de post la

antikveco, la plimultaj daŭre kredas pri la eluzita maksimumo, ĉiam neita de la faktoj : Se vi volas pacon, preparu militon.

Tamen la afero estas pli kaj pli urĝa. La vetkurado inter vivo kaj morto iĝas pli kaj pli rapida. Kiu fine gajnos ?

Valo.

* *
* *

P R I U N U P E R S O N A

S P E R T O

En mia 83a jaro, jen trafis min neesperita ĝojo.

Mi plendis, ke mi ne sukcesis varbi al esperanto miajn parencojn kaj geidojn : "Mi ne estis profeto en mia familio" (Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo).

Ĉi-somere, kiel kutime, al nia somerrestadejo venis ferie mia nepino, 26-jara studentino pri biologio. Ĝis nun ŝi diligente lernis la anglan lingvon : bona scio, almenaŭ lega, de tiu lingvo estas ja tre utila, eĉ preskaŭ nepre necesa en ŝiaj studoj. Ĝus alveninte, ŝi diris al mi : "Mi deziras kaj decidis lerni esperanton". Mi tuj donis al ŝi la ekzempleron de la Nova Racia Kurso, kiu estis al ŝi destinita jam en 1973, kaj de tiam ŝin atendis en libroŝranko ; kaj mi instruis al ŝi la tri unuajn lecionojn. Nun ŝi daŭrigas sola, kaj mi estas trankvila, ĉar mi konas ŝin : kiam ŝi unu fojon ion komencis, ŝi pelas ĝin ĝis finplenumo.

Mi estis la dua esperantisto en mia familio - post mia patro. Nun mi estas certa, ke mi ne estos la lasta.

Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas... Sed iafoje okazas, ke el mil unu ekĝermas ; ĝi kreskos, kaj eble iam portos plurajn fruktojn.

Konklude : Neniam ni malesperu, neniam laciĝu.

Valo.

Ĉe SAT-Broŝurservo : Ĝus reeldonita ofsete estas la aŭtobiografia verketo de nia amiko VALO : "El la kara infaneco..." (12 FF). Restas disponeblaj ankaŭ "Kontraŭflue", "Sepdek Jaroj sub la Verda Stelo" kaj "Migrante tra Metioj".

K I E L Ĝ I N A S K I Ĝ A S

===== daŭrigo de p.26 =====

- kiu ne endanĝerigos ties ekziston, se la eldonkvanto restos en de mi akcepteblaj limoj - nu, tiu sukceso estas rezulto de tiu akceptemo, de tiu manko de pretendemo, kiun oni eble prave povas juĝi "neseerioza". Karaj gelegantoj, la nuna redaktanto estas nepostulema diletanto, jen la fine konfesita abomenaĵo !

Se la formulo de L! estas tiel sukcesa, ke plu alflugos novaj abonoj, kial iu miaspeca farsulo - aŭ tuta grupo da - ne iniciatu duan "Laŭte!" kun pluraj aliaj centoj da "laŭtuloj", kaj tiel plu ???

For la monopolojn ! Ĉiu rajtu sian ŝvitporcion !

Kribo.

P.S. Venontfoje, eble vi legos pri la presado, ktp. Hodiaŭ pigro venkis, kun helpo de S-ro LM, kiun mi kore dankas pro lia kontribuo.

N A S R U D I N

"Venigu nutraĵojn por la kvarpieduloj", nobelo vokis en la korto de Nasrudin, "kaj konduku min al la trankviligaj ĉambroj, kie mi estos konvene regalita."

Nasrudin obeis.

Kiam la nobelo sidis sur kanapo, frandante kafon, Nasrudin venis kun juristo.

"Ĉu via nobla moŝto havas bienon ?", Nasrudin demandis.

"Cent mil hubojn."

"Kaj ĉu vi plugas per kvarpieduloj?"

"Jes, kompreneble."

"Ĉu vi aĉetos dudek kvarpiedulojn po kvin arĝentaj moneroj?"


La nobelo sciis, ke plug-besto valoras cent arĝentajn monerojn, do tuj konsentis.

Nasrudin eliris kaj aĉetis dudek kuniklojn po unu arĝenta monero.

Li transdonis ilin al la nobelo.

"Ni devas agi jure", la juristo diris, "kaj laŭ mi kunikloj estas kvarpieduloj."

Kris Long.



ĉies voĉo

PRI KOMPUTOROJ

Tiuj inter ni kiuj estas olduloj en la kampo de cifer- kaj liter-manipulado pere de elektro-mekanikaj kaj elektronikaj aparatoj, povas aldoni ion al la artikolo de P.M.-G. en Laŭte! 47. Ke mi faras tion, ne signifas, ke mi estas la plej kompetenta persono tion fari, sed signifas nur, ke mi havas apartan intereson en la temo, kaj al ĝi jam donis multan atenton.

Kiam ajn mi legas en artikolo la frazon "nepre forigi la supersignojn", mi komprenas, ke la verkinto de tiu artikolo ankoraŭ ne funde lernis la internacian lingvon. La eraro en la pensmaniero de via kontribuinto estas, ke li (ŝi) pensas, ke iuj Esperantaj literoj foje havas supersignojn. Tute male! En la Esperanto-alfabeto estas 28 literoj; neniam en nia uzo de la lingvo venos al ni la bezono aldoni diakritan signon al literoj (kiel ofte okazas en la franca, angla, nederlanda kaj aliaj lingvoj). La 28 literoj de la alfabeto tute sufiĉas por esprimi ĉiun nuancon de la lingvo, kaj la regulo pri la akcento, ĉiam sur la antaŭlasta silabo, forigas la neceson iel marki la akcenton.

Alia erara pensmaniero estas supozi, ke komputoroj (ne 'komputiloj', mi urĝe petas; komputilo estas alia speco de stranga besto!) subite ekiĝis plenevoluintaj antaŭ du aŭ tri jaroj, kaj estas netuŝeblaj de la vidpunkto de la baza desegno. Antaŭ ĉio, ni devas memori, ke la loko de komputoroj en nia vivo estas tiu de la plej malestiminda sklavo, sklavo, kiu ne havas propran menson nek decidkapablon, sed devas sklave sekvi niajn instrukciojn.

Komputoroj povas fari taskojn egege rapide, vi diras al mi, kaj do ne povas esti malestimindaj sklavo. Mi agnoskas vian vidpunkton, mi respondas, sed la rapideco de plenumo de tasko ne tuŝas mian argumenton. Sen taŭga instrukcioprogramo la komputoro nenion povas fari.

Je tiu ĉi punkto ni devas noti, ke tiuj instrukcioprogramoj, al kiuj mi ĵus aludis, devas esti verkitaj en lingvo, kiun komprenas la komputoro. Ĉu estas surprizo al vi konsiderati, ke la nura lingvo uzebla kun tiuj malestimindaj sklavoj estas dialekto de la usonangla lingvo? Ili devas esti vere stultaj!

Sed tamen tiu sorto estas rezulto de la historio de cifer- kaj liter-manipulado. Kiam mi unue okupiĝis pri maŝinoj en tiu fako, en la jaro 1937, ili neniel meritis la epiteton 'komputa', sed ili povis doni valorajn rezultojn en la kampoj de kontotenado kaj statistikado. Grava bremsa faktoro, tamen, estis, ke ili povis manipuli nur la ciferojn nulo ĝis naŭ en diversaj kombinoj, plus, krome, kelkajn primitivajn manipuladojn pri la dek-du monatoj de la jaro. Ni devas pensi, ke la kapablo manipuli estis limigita al dek-tri signoj en tuto (uzante tie ĉi la vorton 'signo' por signifi aŭ ciferon aŭ literon aŭ interpunkcian signon, kaj tiel plu).

Ne longe poste, kaj ankoraŭ antaŭ la komenciĝo de la dua mondmilito, la desegnistoj sukcesis elpensi maŝinon, kiu havis limigitan kapablon manipuli literojn de la angla alfabeto, sed la rezultoj estis tre primitivaj laŭ modernaj normoj. Maksimume 33 apartaj signoj eblis, kaj oni devis akcepti la saman signon por litero G (majuskle!) kaj cifero 6; alian komunan signon por litero I kaj cifero 1; alian komunan signon por kaj O* kaj litero Q, kaj alian komunan signon por kaj litero X kaj litero Y. (*litero)

Ankoraŭ ne longe poste (proksimume je la fino de la milito, se mia memoro ne eraras), alia desegno permesis 39 apartajn signojn. Krom la ciferoj nulo ĝis naŭ, tiu serio enhavis la kompletan anglan alfabeton de 26 literoj, kaj krome la interpunkciajn signojn: punkto kaj streketo. La kapablo aparte manipuli pri la dek-du monatoj de la jaro malaperis en tiu desegno, sed la tuta rezulto estas granda plibonigo de ĉio, kio estis antaŭe konata.

La posta paŝo en la evoluo estas malfacile klarigebla. Unuflanke okazis plibonigoj en la per-fadena aŭ per-radio-sendita komunikadsistemoj (el kiuj ni ankoraŭ havas la t.n. telekso-sistemon), kiuj estis tiam preskaŭ senescepte elektro-mekanikaj, kaj aliflanke alvenis jam la primitiva komputoro, kiu havis nenian komunikadkapablon, sed grandan kaj rapidan manipuladokapablon, bazitan sur elektronikaj cirkvitoj. Jes, la manipuladokapablo estis subite multe pli granda ol antaŭe: entute 64 signoj!

Sed ĉar la desegnadteamoj de ambaŭ evoluvojoj estis pli-malpli kunligitaj en la sama industrio, se ne ĉiam en la sama entrepreno, la du specoj de evoluo marŝis pli-malpli samritme. Por ni nun la ĉefaj punktoj notindaj estas, unue, ke la komunikadoblecoj estis ankoraŭ limigitaj al 48 apartaj signo-kombinoj, inkluzive de la instrukcio-kombinoj ; due, ke ĉiuj el la evolu-paŝoj okazis inter angla-parolantoj (pardonon! inter usonangla-parolantoj!), kaj trie, ke konstante pli kaj pli da mono estis investata en la esploroj kaj desegnad-laboroj, tiel, ke la kapitalistoj volis eviti ĉiam elspezojn, kiuj malvalorigus iun antaŭan laboron.

Rezulte : la multe pli grandan kapablon de eĉ la primitivaj komputoroj oni ne plene ekspluatis, ĉar farinte tion oni nuligus eblecojn uzi la samajn aparatojn por komunikadbezonoj.

Kiam venis la posta paŝo (la apliko de transistoroj por plirapidigi kaj plikapabligi komputorojn), tiu miopa vidpunkto estis jam kaj poreterne enprofundigita en la mensoj de eĉ nova generacio de esploristoj kaj desegnistoj. La kapablo manipuli 96 apartajn signojn estis nur parte ekspluatita, kaj ekspluatita en maniero zorge elpensita por ne malefikigi pli fruajn investojn, precipe en la kampo de komunikadsistemoj. Ni povus nun elpensi multe pli bonajn manierojn ekspluati la manipulado-kapablojn de komputoroj, sed siatempe la katenoj kaj de la relative primitivaj komunikadsistemoj kaj de la usonangla lingvo estis ne-rekonitaj sed tamen efektivaj bariloj.

Mirige, la mondo pretas, ankoraŭ nun, akcepti la fakton, ke komputoroj pretas, kapablas, obei nur la usonanglan lingvon. La multaj programadlingvoj uzataj en neangla-parolantaj mondpartoj estas ne multe pli ol traduk-sistemoj, ĉar ĉiuj el ili, en la realo, donas al la maŝino instrukciojn en la lingvo de la cirkvitdesegnistoj. Simile kiel en la kampo de lingvaj bariloj ĝenerale, same en la kampo de ekspluatado de la kapabloj de komputoroj, la mondo klinas la kapon antaŭ la monujoj de la usonaj kapitalistoj.

Sed la situacio ne estas tute malesperiga por ni!

Necesas nur, ke ni, kompetentaj Esperantistoj, mem investu monon kaj energion en nova desegno de komputoro, aparato kiu kapablas kompreni la internacian lingvon.

La komenca paŝo estas re-elpensi la internan kodon de la elektronikaj cirkvitoj, por ke ĉiuj el la 28 literoj de nia alfabeto estu agnoskitaj, ne forigante, tamen, la aliajn 4 literojn de la tiel-nomata angla alfabeto. Paralela paŝo estas desegni novan klavaron, uzeblan kaj por komputoroj kaj por skribmaŝinoj, enhavantan ne malpli ol 47 apartajn klavojn por la haveblaj 94 apartaj signoj, plus klavojn por apartaj taskoj, kaj la vojo estas malfermita al verko de primitiva programadlingvo en Esperanto, laŭ la internaj instrukcieblecoj de la baza mikro-elektronika cirkvito, kiun ni elektas por esti la bazo de nia maŝino.

Tio kondukus al verkado de pli rafinita programadlingvo, al verkado de la necesaj programpaŝoj por ebligi alfabetan ordigadon seneraran, kaj al esploroj en la kampo de aŭtomata interkomunikado inter komputoroj. La necesaj desegnad-laboroj por ebligi elpreson de rezultoj en Esperanto ne kostos multon, ĉar multe da pensado estas jam investita en tiu fako. Devos sekvi multaj aliaj evolu-paŝoj, kompreneble, sed diskuto pri ili povas atendi la kompletigon de la unuaj, tiuj plej gravaj, taskoj.

La ĉefa, nepra bezono estas tuta forigo de la penso, ke komputoroj estas niaj mastroj. Ni devas, ĉiuj el ni, interkonsenti, ke la nunaj komputoroj estas tro primitivaj por niaj bezonoj, kaj fidi, ke nova generacio iam naskiĝos, nova generacio kiu, ekde la akuŝo, komprenos la por la mondo genian kreitaĵon de Zamenhof, la internacian lingvon, Esperanton. Por realigi tiun revon, estas ankoraŭ ne tro malfrue por ekdediĉi niajn fortojn al la tasko. Sed ekde hodiaŭ redaktoroj devas rigore malakcepti artikolojn pleningitajn per la defetismo de aludoj al 'supersignoj' en Esperanto.

LM
Rotterdam
1983-03-25.

1234567890123456789012345678901234567890123456789

Pri reformoj... la ĝusta mezo

Mi firme kredas en la estonto de E. Sed por mi la situacio ne estas jam matura. Mi opinias, ke, kiam scienco pri komunikado (komunikadiko?) aperos, kun iloj por mezuri sciencen la efikon de lingvoj, tiam la supereco de Esperanto estos klare videbla por ĉiuj.

Sed tiu scienco aperigos ankaŭ la neceson de adaptadoj kaj reformoj. (Ekz. por pli preciza scienca komunikado). Por tio, la movado devas esti preta flekseble adaptiĝi.

La reformproponoj ne estas malbonaj aferoj, sed neniu rajtas dividi la esperantistojn pri reformo.

Ni sekvu pri tio la ekzemplon de Zamenhof mem, kiu proponis reformojn kaj retiris ilin, kiam li konstatis, ke estis risiko detrui la movadan unuecon.

La reformprojektoj devas esti simpatie konsiderataj kaj pridiskutataj eĉ se (kiel estas plejofte la kazo) ili estas ne taŭgaj. Tio estas pli bona sinteno ol montri sian malestimon per ignoro.

Siaflanke, la reformemuloj devas nepre nek uzi nek uzigi siajn reformprojektojn en la movado antaŭ ol (kaj nur se) ili estas akceptataj de la esperantistaro.

Pri supersignoj.

Tiu problemo estas ĉefe psikologia afero : Pri la nomo de la pola sindikato Solidareco oni fidele transskribis ĉiujn supersignojn sur la afiŝojn kaj flugfoliojn. Plie, la radiostacioj klopodis por prononci ĝin laŭ la taŭga pola maniero.

... Antaŭ kelkaj jaroj la Francoj ridaĉis pri la neprononceblaj polaj nomoj.

La moroj (feliĉe!) evoluas...

Jansebo.

Ĉ A P E L O J , Ĉ A P E L O J !

Mi ne komprenas, kial bonintencaj samideanoj torturas sian cerbon por kripligi nian lingvon, enkondukante en la alfabeton novajn literojn por anstataŭigi la ĉapelitajn konsonantojn. Ili prefere aliĝu al ido, al occidental, al IALA aŭ alia, kiujn ne fuŝas tiuj malbenitaj ĉapeloj, kial do ne ? Eble oni objektos, ke tiuj lingvoj estas nur mortnaskitaj projektoj, dum esperanto vivas (sufiĉe bonfarte, dankon) malgraŭ la ĉapeloj. Kiel grave, por bonaj reformemuloj ? Sed ni estu seriozaj.

La granda laŭmoda argumento estas, ke tiuj ĉapeloj kreus malfacilaĵojn por la uzado en komputiloj (pli ĝuste komputeroj (PIV) aŭ komputoroj, laŭ plej freŝdata tendenco ĉe la fakaj teknikistoj.) Tio ŝajnas al mi falsa problemo, ĉar :

- 1 - En Ĉeĥoslovakio, en Jugoslavio, kc, la naciaj lingvoj uzas ĉapelitajn konsonantojn. Ĉu tio malhelpas, ke ankaŭ en tiuj landoj oni uzas komputorojn ? Mi estas certa, ke ankaŭ en esperanto la fakuloj facile eltrovos rimedon por elturniĝi.
- 2 - En aliaj lingvoj, kiel la angla, la franca, la germana, la itala, la hispana, ekzistas litergrupoj kiel ch, sh, ph, th... Mi neniam aŭdis, ke tio estus ĝena en la uzado de komputoroj. Nu, se oni nepre volas eviti la ĉapelojn, jen estas la simpla solvo, jam donita de Zamenhof : kiam oni ne disponas la ĉapelliterojn, anstataŭ ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ oni uzu ch, gh, hh, jh, sh. Tiel oni procedas ekzemple en telegramoj, kial ne ankaŭ en komputora uzado ?

Konklude : ĉiufoje kiam sin prezentas iu ŝajna malfacilaĵo, oni sin demandu : ĉu la solvo ne jam troviĝas en la Fundamento ? Ĝis nun, miaopinie, tiu sinteno estis ĉiam pravigita en la faktoj.

Valo.

URĜA MESAĜO AL P.M.-G., pri komputiloj.

Kara kun-reformemulo, kiel admonas la popola saĝo, "NE FORĴETU LA MALPURAN BAN-AKVON KIAM ESTAS EN ĜI LA INFANETO", tio estas : ne tro haste transŝorĉu la ĉapelitajn literojn en Q,X,W,Y... nur pro tio, ke la "ĉapelo" malhelpas ilian eniron en komputoron... aŭ simple en telegramon! Mi, nun, tute senĝene skribas Esperante per komputor-tajpilo : mi simple igis la koncernatajn literojn depreni sian ĉapelon kaj teni ĝin en la mano(j) ant'ol eniri latin-alfabetan medion (sed, kompreneble, nur dum ili restas tie!).

Kiel vi mem povas juĝi, ĈYielo, ĜYardeno, ĴYurnalo, SYlosilo, HXoro, restas ANKORAW kompreneblaj por ĉiu esperantisto, kaj, krome, donas elparol-indikon : litero sekvata de Y "plimoliĝas", litero sekvata de X "plimalmoliĝas", la duonvokalo ŭ estas W en la internacia fonetika alfabeto. Y kaj X estus, en Esperanto, nur helpliteroj sen propra sono. Pri la elparolo de ĥ : kiel en la germana Bach. (Laŭ mi, tamen, la simpla elparolo hk estus sufiĉe klara por ĉiuj).

Ni reformemuloj devus STREBI respekti la strukturon de Esperanto : kreskigi novajn ramojn, sed ne fortranĉi la mal-

novajn, kreskigi novajn florojn, sed ne fortranĉi la radikojn...

Ĝis el Lamark.

A L K U R T S C H U T

Bedaŭrinde, Kurt, Esperanto ne taŭgis "por ĉiuj terenoj de la homaj esprimbezonoj"! Ankaŭ mi estas nek lingvisto (nur lingvo-amanto) nek presisto, sed mi praktike konstatis ke :

- A) Esperanto estis lingvo sekse diskriminacia, kaj mi estas virino : ĝi ne estis por mi lingvo "neŭtrala", sed nur ia "VIR-ESPERANTO!"
- B) en Esperanto estis pluraj mankoj (iuj ankoraŭ estas): se vi studus la Plenan Gramatikon de Esperanto, vi trovus kaj la "truojn" kaj la diversajn proponatajn "ŝtopilojn". Ĉu vi vere volas, ke ni proponu al la mondo truhavan aŭ malbone "ŝtopitan" Esperanton ?

La rolo de la konservemaj personoj en Esperantujo restas tamen tiel grava, kiel tiu de la reformemaj : sen reformo, la lingvo iam mortus, sed sen konservado, ĝi mortus tuj! Ne necesas esti lingvistoj por prijuĝi la neceson kaj taŭgecon de io, uzu vian propran prudenton! Se vi pensas, ke proponata "reformo" ne estas taŭga, klarigu vian penson al la proponinto. Eble ĝili eraris : ĉiuj homoj estas eraremaj! Eble ĝili povos ekspliki al vi la neceson kaj la taŭgecon de la "reformo". En ambaŭ okazoj vi estus utila al la disvolviĝo de Esperanto...

Mi, persone, estus tre danka al tiu, kiu post atenta ekzameno de la afero, avertus min, ke iu mia propono ne taŭgas! Kaj mi ne kredas, ke la aliaj "reformemuloj" mistraktos vin pro tio!

Ĝis el Lamark.

De Ĵansebo al G.M. - Dankon pro la respondo. Kie oni povas trovi la liston ? Mi sugestas, ke Kribo aperigu ĝin en L! (kiel suplementanekzempleron), por ke la legantoj skribu pli facile simplajn artikolojn.

Pri "CI" - Paroli plurale al iu pro respekto ŝajnas al mi tute mallogike. Kial ne diri "Ĉia Moŝto" aŭ ion ekvivalentan por indiki respekton ?

Ĵansebo.

Du novaj laŭtuloj nun ekpartoprenas en la koncerto :

"Estimataj samideanoj,

mi salutas vin el Ĉeĥoslovakio. Mi tralegis unuafoje vian gazeton. Mi tralegis la tutan gazeton tre atenteme, kaj konstatas, ke "Laŭte" tre plaĉas al mi. Mi pensas, ke legantoj povas paroli kaj skribi pri multaj aferoj interesaj priskribitaj en via gazeto.

Hodiaŭ mi volas iomete priskribi mian opinion pri lingvaj problemoj esprimataj en artikolo "Vortinflacio kontraŭ rajto al kompreno".

Mi pensas, ke la problemo modernigado de Esperanto estas tre malsimpla por esenco de Esperanto kiel tutmonda lingvo. Ĉiu nacio, aŭ lingva grupo (ekzemple francoj-italoj-hispanoj, slavoj, anglosaksoj) kutimas skribi esperante per certa maniero, reciproke indiferenta. Ili ŝatas kelkajn vortojn pli kaj aliajn malpli. La maniero, per kiu ili kunmetas vortojn por konstrui frazojn estas ankaŭ tre indiferenta.

Sed mi devas rememorigi, ke ĉiuj uzas ĝustan Esperanton!

Tamen kelkaj tekstoj estas por certa persono facile legeblaj kaj kompreneblaj. Aliaj tekstoj malpli. Mi opinias, ke tio estas fakto.

Nun imagu situacion, ke ekzemple por slavoj okazos ebleco modernigi Esperanton. Tiu ĉi afero por ili ŝajnos tre ĝusta, moderna kaj logika. Kial ?

Verŝajne ili pli bone proksimigos Esperanton al sia lingvo.

Tiu ĉi sama modernigita parto por franca leganto ŝajnos mallogika, malĝusta, malkomprenebla - kompreneble!

La tuta afero povas kompreneble ŝanĝiĝi per diversaj manieroj.

Mi lernis jam la rusan, francan kaj germanan lingvojn. Kaj kiam mi komparas tiujn ĉi lingvojn al Esperanto, mi opinias, ke beleco de Esperanto konsistas el simpleco... kiam lernanto post mallonga tempo rimarkas, ke li komprenas Esperante, ke li povas simple interkompreniĝi kun homoj, parolantaj per aliaj gepatrajn lingvojn...

Por simpleco, mi pensas, ke estas necese rifuzi ŝanĝojn en la lingvo. Ŝanĝi nur tre malmulte kaj konsidere.

Kompreneble, por interparoli sur pli alta bazo, faka bazo kaj simile, estas necese uzi fakvortarojn uzatajn por ĉiuj fakuloj interne de fakaj asocioj, aŭ uzatajn de solaj geesperantistoj-fakuloj.

Nur per tiu ĉi maniero ni povas konservi Esperanton kiel lingvon por ĉiuj homoj."

"Fidela leganto de 'Laŭte!', sed ankoraŭ modesta esperantisto (ne tre lerta) mi volus alporti mian ŝtonon.

"Laŭte!" prezentas tre ofte artikolojn pri la Paco, pri la milito, ĉiuj estas interesaj. Kelkaj artikoloj temas pri la disvastiĝo de esperanto. Mi ŝatus, ke tiuj artikoloj estu pli "...muskolaj" (ĉu viglaj? - red). Kial? Ĉar mi konsideras, ke ni havas gravan ilon inter la manoj, nekompareblan por solvi malrapide sed certe multe da problemoj. De kelkaj jaroj kaj ankoraŭ por kelkaj jaroj, ni estas je la ĉarniro de du mondoj, kaj la momento estas do privilegia.

La libereco estas necesega por la Homo, ĝi trudiĝas pli kaj pli, proporcie kiel la Homo liberiĝis. Ni estas liberaj imagi, kio estos homo de morgaŭ, sed ni esperantistoj devus scii kion ni volas!, t.e. socion liberecan, egalecan kaj solidarecan, en kiu la homo povos vivi sen mastroj, sed kun egalaj homoj, parolantaj saman lingvon, same kiel fratoj.

Estu seriozaj! La Moraleco sola permesos la Liberecon."

Jean Royer.

Respondo al surdula respondo.

En mia artikolo "For la Frenezulon!" (Laŭte n°42) mi ne kontestas, nek intencas kontesti, ke la nombro PI 3,1416 estas fakto. Ĉiuj homoj ja scias, de la lernejo, pri la reala ekzistado de PI, kaj mi mem, en mia artikolo, sufiĉe rebatas pri tia fakto, por ke ne estu bezone plu insisti pri tiu aparta punkto.

Kial do K-do P.M.G. rebatas min, en Laŭte n°47, ke PI estas fakto kaj ne Dogmo? Tio estas respondo de surdulo, kiu ne provas, aŭ ne volas kompreni, ke la temo pri traktita ne estas la fakto sed la empiriaĵeco de PI, kiun oni altrudas de jarmiloj, kiel nekontesteblan veron, do dogmo laŭ la difino 3 de PIV.

Tia surdula respondo devigas min ripeti, ke la racionala kaj preciza PI ne estas la kvociento de la cirkonferenco per ĝia diametro sed la kvociento de kvadrato per la kvadrata radiuso (R^2) de cirklo, kies surfaco estas egala al tiu de la kvadrato, kio necesigas la antaŭan solvon de la cirklokvadrato.

Se K-do P.M.G. deziras prave kaj utile rebati mian aserton, li nur klare demonstros, helpe aŭ ne de komputero,

kial mi eraras, kial PI ne estas empiria nombro, kial la cirklokvadrato estas nesolvebla problemo. Nur poste, se necesas, mi mem, miavice, provos demonstri la malon, helpe de Julo Ŝtrumpfo, mia propra kaj interna komputero.

Rilate la Bibliion, mi ne memoras pri aludo en ĝi al la nombro PI, kiu estus nur 3. Se temas pri la Triunuo, la referenco ne kongruas. Ĉar la Triunuo, t.e. : la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito, aŭ Parakleto, nepre bezonas por efektivigi la peron de Maria, virga materio kaj Dipatrino. Konsekvence, fakte kaj antropomorfisme, la Triunuo konsistas el kvar personoj. Ĉu Maria estas kalkulata en ĝi per 0,1416, ĉu per 0,1406? La problemo restas solvota.

Cetere, mi ankaŭ tute konsentas kun la finaserto de Kdo P.M.G., ke "malpreciza kono (kun aŭ sen helpo de komputeroj) estas ofte erariga kaj ebligas trompi homojn kaj malhelpi progreson". Ĝuste pro tio mi verkis : For la Frenezulon!... kaj ankoraŭ atendas klaran kaj matematikan refutan demonstradon.

Anonima B.G.D. (Eymet)

Pensado pri

"K I O E S T A S C I O N I S M O"

Sincere mi kompatas Teddy Löwenkopf pro liaj malgajaj, amarecaj, eĉ kompreneblaj sentoj... Ĝuste juĝi popolaferon (same kiel propran aferon) nur tiuj, kiuj ĝin travivas, tion povas fari; kvankam, pri popolafero, eĉ la plej koncernataj konas ne la tutan cirkonstancaron. Tiu fakto okazis, plu okazas ĉie, en la ĝismuna homsocio, kaj bedaŭrinde eble plu daŭros... Bonege Valo tion klarigas en sia artikolo "Krimulo kaj krimuloj". Hipokriteco, profitoj kaj samdevenaj "virtoj" instigas la ŝtatregantojn spite la malfelecion, kiun tiuj agadaĉoj havigas al la popoloj. La militantoj en Mezoriento suferas la saman manipuladojn kiel ĉiuj militantaj popoloj : sekrete, ĉiuj ŝtatregantoj traktas pri profitoj kaj malkaŝe ili prezentas al la popolo tian konfuzadon, ke estas neeble al la koncernataj popoloj (israela kaj palestina) ĝuste juĝi la aferon. La Israelanoj kaj la Palestinanoj estas egale kompatindaj homoj. Nur la popoloj suferas dum militoj (inter aliaj agadaĉoj!). Por pravigi ĉion supre skribitan, jen eltiro de teksto (temas pri la artikolo 231, kiun la "Versajla Traktato" enhavas). Resume : ke Germanio kulpis pri la "buĉado", kvankam la Aliancitoj

sciis siatempe, 1. ke la rusa mobilizado naskis la buĉadon, 2. ke en 1917 la Kronprinco, post la batalo de la Marmo, influis la ĉefstabon, celinte rapidan packonkludon, eĉ se ĝi postulus la rezignon de Alzaco-Loreno, 3. ke, en septembro 1917, klopodoj pri paco okazis fare de Laneken-Briand-Wilson. Ĉion ĉi la franca popolo ne sciis; tiam tiel lerte manipulata, ĝi iĝis la plej malklera, naciista, la plej utila al la ambicio de la armilvendistoj, el la popoloj. Tia manipulado celis la konsenton daŭrigi la militon. Cirkulis aĉaj asertoj, ekzemple pri "tranĉitaj manoj". Germanio deziris internacian enketon pri tiu aserto; ĝi estis malpermesita. Ekde la 26a de nov. 1918a, per diplomaciaj dokumentoj Germanio pruvis, inter aliaj aferoj, sian senkulpecon; sed la aliaj pactraktintoj ignoris tion kaj neniam konsentis forigi tiun faman artikolon 231. La Germanoj malfacile suferis tian maljustecon... Hitlero sciis ĝin uzi; tio estis unu el la faktoroj de lia potenco.

Ĝis nun, verŝajne, la legintoj sin demandis: en kio la "Versajla Traktato" utilas por klarigi la mezorientan situacion? Jen: por montri kiel estas malfacile por la koncernataj popoloj ĝuste juĝi la situacion, pro la fia informado. Do, laŭ mi, neblas por la mezorientaj popoloj, kvankam ege koncernataj, klare juĝi la faktojn.

Kribo proponas al la gelaŭtuloj "femi" t.e. "efike diri"... Multaj homoj "femas" (femis), sed la potenculoj, aŭ ties marionetoj, ignoras iliajn "efikajn voĉojn" (pacistoj, kontraŭnukleaj aktivuloj, anarkiistoj, abundanoj, ktp).

Mi provas "femi": Se eblus al Palestinanoj, Israelanoj (la simplaj homoj) memzorgi pri sia sorto, tutcerte ili interkonsentus, dank'al federaliĝo; sed la mondregantoj, la profitantoj (armilvendistoj inkluzive) malhelpas tion, helpate de la ĉiama lambastono de ĉiuj ŝtatoj: la Religioj. Tia agado ne estas novaĵo, ĝi estas la bazo de ĉiuj subpremoj, sub ĉiu ajn ĉielo.

El ĉiuj homaj malfortecoj, la fanatikeco estas tiu, kiu kaŭzas la plej grandan malbonon al la socio.

Suzana.

Pri cionismo *****

Ĉu cionismo havas pozitivan kaj fruktodonan bilancon? Ju pli mi informiĝas pri la mezorientaj eventoj, des pli

mi estas konvinkita pri kulpeco de cionismo.

Kiom da Araboj, Palestinanoj mortis, estis vunditaj, malliberigitaj, nun loĝas en la malhumanaĵaj rifuĝkampadejoj! Ankaŭ kelkaj israelaj pacifistoj suferas pro tio. Fanatikeco, malamo, perforto, mizero, ĉu tio estas "promesita tero"?

Iom da historio.

1896 - La cionismaj ideoj estis formulitaj de aŭstra judo Teodoro Herzl.

1897 - Unua kongreso en Bazelo. Jen la kongresa deklaraĵo pri cionismaj celoj:

- . la judaj enmigrantoj estas kuraĝigataj kolonii Palestinon, kreskigi agrikulturon, industrion laŭ la landaj eblecoj.
- . organizado kaj kunordigo de la tuta juda popolo per lokaj kaj internaciaj asocioj.
- . disvolvado kaj profundigo de la cionisma ideo.
- . akiri aprobon de la alilandaj registaroj.

- la 2an de decembro: Balfour-deklaracio. La angla registaro subtenas la cionistojn por kreado de juda ŝtato en Palestino.

majo 1942 - Biltmore-programo. Okazis en Nov-Jorko konferenco pri la judaj aferoj.

- . Unuafoje oni postulas, ke la juda nacia hejmo estu juda ŝtato, kaj en Palestino, senprokraste oni kreu cionistan komunumon.
- . Formado kaj rekono de cionista militpotenco havanta propran flagon.

1945 - Esceptaj leĝoj. Ili ankoraŭ validas, sed oni uzas ilin nur kontraŭ la araba civila loĝantaro vivanta sub israhela okupado.

29an de novembro 1948 - Dispartigo de Palestino.

la 9an de aprilo 1948 - Deir Yassin masakro. La IRGUN-movado sub gvido de Menahem Begin atakis tiun vilaĝon proksime de Jerusalemo. 400 personoj tie vivis, nur 50 fuĝis kaj postvivis tiun masakron. Por ne same pereji 750 000 timigitaj Araboj forlasis siajn domojn kaj iĝis rifuĝantoj.

post la milito de 1948 - Sep leĝoj estis ellaboritaj por laŭleĝigi la disrabadon de arabaj bienoj. La cionistoj nomas tion: "terbiena savo".

Por pli da informoj pri la tragedio de la palestina popolo post alveno de cionismo, legu la kortuŝajn atestojn kolektitajn de Anwar Abu Eishe* (* fino p.42.)

"Kiam mi estis infano, mia najbaro estis judo, kaj min savis li okaze de la eventoj de 1948. Mi estas dangerega por la cionistoj, ĉar mi kredas al amikeco inter judoj kaj araboj"...

La libro : "Mémoires Palestiniennes" - La terre dans la tête - Postparolo de Israel Shahak (prezidanto de la israela ligo pri homaj kaj civitanaj rajtoj). Eldonis en la franca : Clancier Guénaud, 49 rue St André des Arts, F 75006 PARIS.

Ginette.

P R I R A S I S M O Vidpunkto de Nigra-Piedulo*

Kial ne agi kun la Alĝerianoj same kiel ili agis kun la Francoj ? Ĉu vi opinias, ke normalas akcepti en Francio du milionojn da enmigrintoj kun iliaj familianoj, kvankam tiuj samaj enmigrintoj trudis sub minacoj la nigra-piedulojn forkuri en Francion ?

Ĉiu justa aranĝo devas esti reciproka. Kiel ebligi adaptiĝon de tiuj individuoj sine de la loĝantaro en Francio ? Ĉi ja estiĝas kontraŭ ni, ĉar la magrebanoj, krom iuj esceptoj, estas tute ne asimileblaj. Ni ja konstatis en Afriko, kie ambaŭ popoloj neniam povis miksiĝi. Ili ne pli bone faros ĉi tie, ĉar la enmigrintoj konservas sian lingvon, siajn tradiciojn, sian kulturon, sian menson kaj sian religion (C.G.T. postulis paŭzojn por la mohamedanoj de la naciaj uzinoj, por ke ili preĝu direkte al Meko.) La grandanimeco, kiun oni havas por ili, estas nura signo de malforteco. Ni Eŭropanoj ne povas kompreni kaj ili ne povas kompreni nian civilizon, kiun ili malestimas. Nia civilizo estas jam en mortdangero kaj ŝajnas absolute necesa ĉesigi la enmigradon.

La magrebanoj ne estas dezirindaj en Francio pro diversaj motivoj tute apartaj de rasismo. Se ili estas malbone akceptataj en Francio, la nura kaŭzo estas, ke la Magrebanoj estas tro malsamaj kaj pro fideleco al Korano, deziras resti tiel. Ili havas nenian bonvolemon por eventuala adaptiĝo. Profunde en sia animo ili konservas mal-

* La Nigraj Pieduloj estas eŭropanoj, kiuj naskiĝis en Alĝerio. Ili venis el Francio, Hispanio, Italio kaj el aliaj mediteraneaj landoj. Kiam F.L.N. venkis la francan armeon, ili estis devigataj forkuri el Alĝerio. Preskaŭ ĉiuj instaligis en Francio.

amikan senton, kiu reaperas je la unua diskuto. La Araboj, krom esceptoj, neniam adoptos nian vivmanieron. Ili diras: Ni okupos Francion per la ventro de niaj edzinoj... La projekto estas sur bona vojo. Sufiĉas konstati, ke la Magrebanoj naskas kvinoble pli ol ni pro oboe al Islamo kaj dank'al familia kromsalajro. Parolante pri Francio, ili ja diras : "la tero de niaj prapatroj", ĉar en 732 ili venis ĝis Poitiers!

Baldaŭ en nia propra lando ni estos nur minoritato kun ĉiuj maloportunaĵoj, kiuj tion akompanas. Kaj diru : Kiel ni povus esti aktiva minoritato, dum, estante la plejmulto, ni ne sukcesis ŝirmi nian civilizon ?

Neniu fremda lando akceptus vidi Francojn agi tiel libere, kiel agas la Magrebanoj en Francio (ekzemple, la statuto aplikata al enmigrintoj en Svislando : dum 4 jaroj ili estas loĝataj de la Konfederacio, devas labori 9 monatojn, reiri 3 monatojn al sia hejmlando, poste ili ricevas permeson labori la tutan jaron, krom unu monato por libertempoj, sed ili ne povas loĝi ie ajn kaj la infanoj ne estas akceptataj en la lernejo ĝis kiam la enmigrinto atingis tempon, kiam li povas iri loĝi en vera domo kun permeso labori la tutan jaron... sed la permeso valoras nur por 12 monatoj, nature ĝi estas renovigebla... ĉu vi diros, ke la Lando de la Ruĝa Kruco estas rasista?). En Francio estas sufiĉe da naivuloj por defendi la absurdan sistemon nome de demokratiaj principoj. Agi oportune estos taksata kiel rasismo.

Tio estas stultega vorto, despli ke ĝi estas ĉiam en unika direkto de la veraj rasistoj, ĉu disĉiploj de l'Profeto sendita de Dio por konigi al tuta homaro la Noblan Koranon, aŭ al "elektita popolo" de la Biblio.

(Aranĝo de letero de marsejla nigra-piedulo)

LUPO.

* dum tiu unua periodo ili ne rajtas venigi familianojn, dum la lasta ili ne rajtas peti la "svisan civitanecon".

Pri tiu temo la red. de L! permesas al si konsili la legadon de la broŝuro "La Migrintoj en Francio nuntempe" de Pierre de Cazenove, ankoraŭ havebla ĉe SAT-broŝurservo en malmultaj ekzempleroj. La temo plu aktualas, eĉ ankoraŭ pli akute, kaj estis multe aludata dum la marta balotkampanjo en Francio. La dokumento liverita de LUPO montras kruele iujn aspektojn de la problemo. Kion opinias pri tio la laŭtularo ?

-nn- rakontas : KIEL MORTIS

***** MIA EDZINO

Ni, tre maljunaj, iam estis de nia kuracisto senditaj por kolekti novajn fortojn en iu sanigejo.

Ĉi tion ni baldaŭ bonege sukcesis.

Antaŭ la fino de nia restado mi estis petata de la financa estraro por pagi diversajn elspezojn - telefonadon, lavadon de nia vestaro, ktp. Ĉar mi opiniis, ke la fakturo estas tro alta, mi diskutis proksimume duonhoron kaj revenis en nian ĉambron.

Alvenante, mi renkontis ĉe mia patrino pastoron.

Ĉar mi estas konvinkita ateisto, mi lin forte insultis, dirante, ke Dio ne ekzistas, estis inventita antaŭ 6000 jaroj aŭ pli, kiam la homoj estis ankoraŭ duonsimioj kaj kredis, ke en ĉielo ekzistas homoj (kiel ni) kapablaj sendi sunon aŭ pluvon, kiam tio plaĉis al ili, ktp.

Li foriris kolere, sen povi min respondi.

Poste, mi proksimiĝis al mia edzino. Mi ŝin demandis, kion ĉi tiu homo al ŝi rakontis. Ŝi respondis : "...ke mi ne devas timi la morton, ke en ĉielo mi revidos ĉiujn amikojn kaj geparencojn mortintajn sur la tero, por tie vivi eterne, ktp." Kaj ŝi demandis min : "Ĉu vi opinias, ke por mi la horo venis por morti?"

Mi respondis, ke ĉi tiu homo vivas de la timado de la popolo. Li scias, ke li mensogas, sed niaj leĝistoj faras nenion, por ke li kaj samspecaj homoj estu punataj promesi ion, kion ili scias mensogo.

Sed jen miaj paroloj ne plu utilis. Ŝi sentis foriri sian cerbon. Tuj alvokite, la surloka kuracisto ordonis tujan transporton al grava hospitalo, kie ŝi mortis tri tagojn poste, ne retrovinte sian esprimkapablon.

Kaj la pastoro daŭrigas sian malhonestan agadon... kvazaŭ li ne povus gajni alimaniere sian vivon.

-nn-

P.S. al la artikoleto pri eŭropa statuto por la "objektantoj" (p.17) : La 6an de aprilo 1983, la franca registaro sub prezido de Prez. Mitterrand decidis plurajn aranĝojn por la organizado de la militservo. Sed ĝi ne ŝanĝis la daŭron de la anstataŭa civilservo por la "objektantoj": kontraŭe al la rekomendo de la Eŭropa Parlamento, tiu daŭro restas fiksita je 24 monatoj. Sen komento.

Valo.

Por la infanoj :

la nubeto...



Dum la tagoj, kiam la vetero malbelis, la nubeto ne sciis, kiel okupi siajn ripozamuzojn. Iun tagon, kiam li enuis pli ol kutime, li decidis iri promeni por sin aerumi.

La vento tre forte blovis. Trapasante, ŝi forbalais ĉion, la folioj tremis ĉe la arbopintoj, la ĉapeloj de la sinjoroj kaj sinjorinoj ruliĝis teren.

En la malproksimo la nubeto ekvidis multkolorajn paperojn, kiuj gaje rondiris. Li alpaŝis por ilin kapti, ĉar li trovis ilin tre belaj, sin demandante, kion li povos konstrui el ili.

La vento ĉiam blovis kaj la paperoj flugis inter liaj fingroj. Rigardante ilian svingiĝon, la nubeto pensis : - Mi tuj faru kajton.

Tuj li komencis la laboron, ilin eltondante, gluante sur lignobastonetojn, kaj baldaŭ lia kajto estis finita.

Li tre fieris pro sia verko, kiun li tuj uzis. Kiel bela estis lia kajto, kiu rapide ĝiris en la ĉielo, stelumis je la flama suno!

Li ludis dum horoj. Vere tre beleta estis tiu kajto kaj mirinde funkciis. La nubeto promesis al si ludi kun ĝi ĉiufoje, kiam eblos.

Tial, kelkafoje en la ĉielo, kiam dum pluvotagoj brilas la suno, oni vidas tute blankan nubeton, kiu tiras post si multkoloran, erarige similantan ĉielarkon.

J.P. Hennebois
kaj la kajto

Anonceto : Niaj nomoj estas Heiko Lucas (14-jara knabo) kaj Kaspar Domke (ankaŭ 14-jara knabo). Ni deziras komenci korespondadon kun samideanoj el tutmondo.

Skribi al : DDR/G.D.R./RDA
1950 Neuruppin
R.-Breitscheid-Str.38
Kaspar Domke.

plogoo

Rakonto por niaj infanoj

Foje estis, proksime del jaro 2000, vilaĝo nomata Plogoo.

Ĝi troviĝis supre de klifo, ĉel fino del tero, en ekstrema okcidento, en loko kie la Keltoj finintis sian longan periplon tra Eŭropo, en loko kie la lumturoj sternantis siajn lumbrakojn, videbligante la lastajn magiajn insulojn drivantajn sur la maljuna oceano.

Kviete vivadis la homoj en tiu ŝirmejo for, plioftis tamen la ĝojoj ol la penoj. Tial, ili emis kredi ke la Paradizo povus esti sur la tero nur pro volo del homoj.

Sendube, la maro, la tero kaj la ĉielo tie miksiĝis tiom bele kaj harmonie ke la plej mizeraj homoj troviĝis ankoraŭ sufiĉe riĉaj antaŭ la trezoroj de malleviĝanta suno, oraj genistoj inter erikoj, aŭ bukedoj da birdoj en ĉielo ; sendube, la plej malkleraj uloj estis sufiĉe inteligentaj, pro vivado kun la tero, la maro kaj la ĉielo, por kapabli je ĝusteco kaj saĝemo pri ĉio ajn.

Tiu komenco del mondo sentis sin iom respondeca pri la kontinento, kiu spruĉis el la maro ĉi tie kaj daŭris post mejloj kaj mejloj ĝis la leviĝanta suno.

Kaj tiu ekstremaĵo del mondo vidis veni el malproksimaj landoj homojn de ĉiuj rasoj kaj de ĉiuj koloroj.

Ili venis dum pleja somero, je miloj, en densaj vicoj, per polvo kovritaj, lacegaj antaŭ ol gluti marvastan aeron.

Antaŭ malaperonta suno ili restadis, mirfrapitaj, kvazaŭ ilia destino senfine sternantis antaŭ ili, revelaciante ilian forgesitan diecon.

Poste ili reiris al siaj malproksimaj landoj, kun revplena kapo, sciante ke la ĉielo foje surteriĝas kaj ke la horizonto ne havas limon.

Nu, jen okazis sur tiu terekstremaĵo kvazaŭ ekvinoksa ŝtormo, kvazaŭ printempa tajdego, kvazaŭ ektondro, mirigiga novaĵo : tiu sankta ejo estis ricevinta la rimarkindan honoron esti elektita por provizi lumon al iu Metropolo.

Pompaj konstruejoj estis malfermotaj, ondoj da betono fluontaj, strandoj ŝtopiĝontaj, digoj starontaj kaj vo-

joj plivastiĝontaj sub ombraĵo de fostoj.

Kompense tion, kompreneble, kiuj plej bezonas, tiuj profitus multajn avantaĝojn.

La urbestro ĝentile respondis, ke "multaj avantaĝoj" estas troe, kiam sufiĉe malavara estas nature la naturo; kaj pri lumo, devos Metropolo mem akiri ĝin, la ĉi-tieaj homoj tute klare vidas, ĉar estas sufiĉe hele.

Ili pensis, ke denove ili povas dormi trankvile, sed Metropolo revenis en sturmo.

Tra jaroj, oni vidis ĝin foj'al foje ornamita samkiel putino fanfaronanta kaj alloganta, minacanta megero aŭ eĉ maskanta siajn ministrojn pri industrio en ministrojn pri turismo distribuistojn del ĉiela manao.

Sed ĉiufoje oni senmaskigis la Judasojn kaj ilin resendis hejmen kune kun ties tridek denaroj.

Tiel pasadis la afero kaj tiu pacema loko agitiĝis pli kaj pli.

Unuj plenpulme kriadis kaj plenbrake afiŝadis por alarmi tiujn, kiuj dormadis kun vaksbuletoj en oreloj kaj vidis nur tra nigraj okulvitroj.

Kaj iun tagon, evidentiĝis la minaco.

Plenmano da perfiduloj delogis klikon da senkonsciaj homoj, kiuj balotigis asembleon da pedantaĉoj timemaj pri ventoturoj, por ke ili elektu ĉi tiun terpecon por plenumi sian krimegon.

- Estis la tempo, kiam la prienergia krizo estis plej ampleksa farso elpensita de deliraj ŝtatoj,
- kiam la homoj havis ĉiujn rajtojn kaj nenium devon plu,
 - kiam oni ŝuldantiĝis por riĉiĝi,
 - kiam mono igis avida kaj nefeliĉa,
 - kiam oni perdis la esencaĵon pro timo ke la superfluaĵo mankos,
 - kiam ĉiu malsaniĝis por asekuriĝi kontraŭ malsano,
 - la tempo de prospero, kiam la homoj mortis pro malbela meze de plenaj rubujoj,
 - kiam rabis la policistoj,
 - kiam brulegigis la fajrobrigadistoj,
 - kiam la juĝistoj juĝadis unu la alian,
 - kiam unuj naskiĝis senkruraj kaj aliaj kun radoj anstataŭ gamboj,
 - la tempo kiam la ŝtatoficisto kontestadis, strikantoj eklaboris tiam, kiam strikis senlaboruloj,
 - la tempo kiam nur unu laboristo nutradis milionojn da asistatoj,

- kiam la ŝtato serĉadis ideon por akiri petrolon kaj ideon por forpeli ĝin el sia marbordo, Unuvorte, la tempo kiam hipokriteco estis levata al rango de institucio.

Nu, do, Metropolo, armita per tiu senhonta baloto, sendis la nigrajn taĉmentojn de siaj malordofortoj.

Sed la Keltidoj jam kutimiĝis vidi tiom da kaj eĉ pli, de post jarcentoj da invadoj far' barbaroj kaj ceteraj Romaj legioj.

Reeliriĝis la ŝildo, katapultoj, balistoj kaj bruligiloj.

Noktetage, dum semajnoj, la fortoj de bono kaj malbono kontraŭstaris.

Oni vidis la kalvariojn profanitaj, la preĝejojn okupitaj, la seminarion ruinigitaj.

Virinoj, infanoj, maljunuloj viciĝis kontraŭ la hordoj venintaj de la kontinento.

Diluva pluvego falis sur la landon, la ĉiela velo disŝiriĝis kaj la Bresta tondro surdigis la bruegon de blankarmiloj interfrapiĝantaj kaj de grenadoj.

Oni vidis vidvinon kraĉi al la tirano, orfon insulti la patron kaj prapatron vangofrapi la fraŭlon. La aziloj pleniĝis de legianoj grave malvigligintaj pro la bastonado de siaj sammizeraj fratoj sur la barikadoj.

Kaj iun tagon, la suno reaperis, la birdoj ekkantis, hobojoj kaj sakflutoj eksonis super la uleksejo; la mallumaj fortoj, lacegiĝintaj, refluis eksteren del sanktaj lokoj.

Tiam okazis periodo da printempa ĝojego, milionoj da pilgrimantoj, kun flagoj al vento, kantikoj ĉe lipoj, kun manoj plenaj de oboloj faris el tiu mondfina terpeco altan pilgrimejon.

Sed ankoraŭ sin kaŝis kelkaj nigraj komplotoj.

Kerne de Metropolo oni elpensadis hontindajn manovrojn por cediĝi tiam loĝantaron, kiu ne plu kredis je la megaŭato, la platarboj nek je la antaŭe-premita betono kaj devigi ĝin sin fordoni korpojn kaj bienojn al ĝia povo.

Tiam, la tuta regiono suferis plej kruelajn brutajojn.

La elektroteo iĝis sorĉa kaj uzura feo sub ordono de Metropolo.

Oni interrompis la komunikadojn kaj, supera kruelaĵo, ekmankis la televido.

Sed, finfine, oni tuj konsciis, ke sin lavi per malvarma akvo estas solvo al la problemo de akvovarmigilo,

ke vivadi hejme estas vera feliĉo kaj ke la noktaj festoj povis senĉeniĝi de la mutaj Metropolaj antenoj.

Kontraŭbatale al tia Metropolo, kiu sufiĉe inteligentis por vivi 5 milionojn da loĝantoj en ejo, kie ne kreskas eĉ plej eta rafano, oni decidis senigi ĝin je karotoj kaj terpomoj. Kaj ĉar la ŝtato cinike konfesis, ke mankis al ĝi energio, nu Plogoo respondu Kambronn-maniere per sia elsterka gaso kaj sia unua ventoturo.

Beleno, la suna dio kaj ankaŭ la dioj de vento kaj akvo estis anstataŭontaj la fridpisantajn teknokratojn el Metropolo.

Estis la tempo kiam oni ekkonsciis, ke laboro estas kompatemo,

- kiam la infanoj ree naskiĝis kun gamboj anstataŭ radoj,
- kiam la ververa riĉeco iĝis interna,

Entute, la tempo kiam religieco iĝis scienco kaj politiko, moralo.

Estis komenco de nova civilizo, kiu estis enterigonta la oldan kaj recikligonta siajn rubojn antaŭ ol sufoko.

Super la landlimoj mirakle estiĝis frateca fluego. Observantoj el najbaraj planedoj venis. Pli forta ol ĉiuj povoj, ĉiuj blindaj fortoj, pli fortaj ol leĝoj, intereso, malpermesoj, sama vero levigis la popolojn, kiuj volis plu-vivi kaj ne plu grasigi la gangrenajn kapojn, kiuj regadis ilin.

Laŭ inversa vojo, kiu estis trairinta Eŭropon ĝis Kornvalio, la movado trafis tutan Eŭropon ekde ekstremokcidente ekstremorienten.

Estis komenco de nova aĝo kaj del Erao del Akvariuso pri kiu orakolis la profetoj.

Ĉiu fine estis trovinta ĝustecon pri ĉio, retrovante sian animon.

Kaj nun, kiam ekŝvelas kapo de iu Nukleokrato, Teknokrato, Prefekto kaj iu Krato ajn kaj kiam ĝi nepre deziras feliĉigi aliujn malgraŭ ili, tiam ili-ĉi sendas ĝin plej rapide aerumi apud Plogoo.

Tiel oni povis vidi ministron, distingindan ekonomiiston, altan konsilanton recikliĝi en sama odoro de sterko aŭ paŝti ŝafojn en sovaĝa uleksejo.

Daŭre staras la olda ventoturo front'al la maljuna oceano kvazaŭ vivanta simbolo.

La olda krio de la Keltoj estas gravurita en granito ĉe ĝia bazo :

LA VERO FRONT' AL LA MONDO

al Plogoo,
al Beleno,
la tuta homaro dankas.

Tra ĝiaj aloj, la vento naskita del ĉielo kaj maro, blovas plu en la orelojn, ke la feliĉo, dank'al Dio, ne estas mezurebla en kiloŭatoj.

BELENOS.

(E-igis Patrick Chevin)

.....

Post tajpado kaj multobligado de la artikolo "Além da heresia do esperanto" (p.10/12), alvenis aldono de Patriko al tiu artikolo. Bonvolu ĝin trovi ĉi-poste :

Além da heresia do esperanto

Fine, tiu lingvo aspektas kiel esprimilo de la Tria Mondo, t.e. de plimulto da homoj sen nutraĵo, sen instruoj kaj sen justeco, al kiuj ne decas kaj senutilas paroli pri abstraktaĵoj senkonsistaj idealoj. Pli bone doni al ili justecon kaj komprenon kaj rezigni pri niaj privilegioj kaj niaj bonkonsciencigaj ideologioj, se ni serioze kaj sincere interesiĝas pri ili kaj pri estonteco de ĉi planedo. Jen la kerno de la afero : ĉu nin interesas aliaj homoj kaj realecoj aŭ nur niaj propraj ideoj, t.e. nia bildo en la spegulo ? Ĉu ni kapablas agi solidarece aŭ eĉ ne kapablas eliri el cirklon de konsumaj rilatoj en kiu Esp-o aspektas inter aliaj intelekta varo por vendi? Ni lernu ne plu pensi duece. Ni ne konsideru nin Esp-istoj, kies ĉefa problemoj estas, ke la aliaj homoj ankaŭ Esp-istoj ne estas. Ĉu ni kapablu pri sindonemo, sinforĝeso kaj eks-tazo antaŭ kio ne devenas de ni? Tion mi petas de la strangaj verduletoj : fuĝi la aŭtoritaton de la grego kaj memstare vivi per la koro.

.....

La azeno de Nasrudin ektimis pro io sur la vojo kaj ekkuris.

Komparanoj demandis mirante : "Kien vi tiel rapidas, Nasrudin?"

"Ne demandu min", la majstro kriis, "demandu l' azenon."

Kris Long.

laŭtaj informoj kaj petoj

Impresoj pri la SAT-Amikara Kongreso

Dum la Kongreso, la vetero estis relative bela, kompare kun tiu, kiu regis aliloke, eĉ en Sud-Francio, kie neĝis kaj frostis.

Dimanĉe, ĉe brila suno, ni marŝis sur la Pado de la Dogan-istoj, de kie ni havis vastan panoramon. La tuttaga ekskurso okazis sub la pluvo, ĉefe matene. Tio ne tro ĝenis nin, ĉar ni vizitis Pleumeur-Bodou, la Nacian Centron de Telekomunikaj Studoj kaj la t.n. "Radôme", grandan balonon, kiu ŝirmas la unuan antenon. Interne ni spiris en iomete kunpremita aero, sen ĝeno. Ni konsciis pri tio, kiam, tra eta aperturo, ĉe la dua enireja pordo, forta blovo eliris : tiam, tra la vitra parto de tiu pordo ni legis en la fizionomioj de la atendantoj la malplezuron, kiun tiu blovo havigis al ili. Kelkfoje, ŝercante, la gvidanto malfermas la aperturon.

Posttagmeze ni marŝis sur ĥaosaj rokegoj el rozkolora granito, laŭlonge de la oceana bordo. Bela naturmirindaĵo! Mi plezure ĝuis tiun pitoreskan pejzaĝon, malgraŭ la malbela vetero. Kaj la streĉa atento por ne mispaŝi. Certe, la alta tajdo, plaŭdante kontraŭ la rokegoj, estus bela vidaĵo, sed ni ne havis la tempon ĝin atendi. Proksime, interne de la regiono, estas rokegoj, kiuj memorigas al mi tiujn de "Sidobre" en Tarnio.

Ĝis nun, mi parolis nur pri la distra parto de la Kongreso, tio ne signifas, ke mi neglektis la diversajn kunsidojn.

La loĝejo, en "Rocher St Martin" estis tre komforta. Unuvorte la O.K.K.-anoj bone laboris,

Suzana.

.....

Esperantista semajno - Septembro 11/18 : dum 7 tagoj apud strando ĉe urbo Sète. Programo : diversgradaj kursoj, banado, agrabla ĉirkaŭaĵo, distraĵoj, aranĝoj. Informas: CENTRE CULTUREL ESPERANTO, C.I.J. impasse de la Petite Corraterie, F 34000 MONTPELLIER, Francio.

REZOLUCIO
DE LA 38-a KONGRESO
DE SAT-AMIKARO

---o---

La 38a Kongreso de la Laborista Esperanto-Asocio por Franclingvaj Landoj (SAT-Amikaro, 67 av. Gambetta, 75020 PARIS), kiu okazis en ST BRIEUC, de la 2a ĝis la 4a de aprilo 1983, kun ĉeesto de 170 partoprenantoj, aprobis rezolucion, kies teksto sekvas :

La Kongreso,

- notas kun kontento, ke pli kaj pli da eminentuloj, sciencistoj, instruistoj, organizoj kaj movadoj, direktas kreskantan intereson al la disvolviĝo de la aplikoj de la Internacia Lingvo Esperanto, kiel ekonomia, praktika, kaj justa solvo al la problemoj de lingva transnacia komunikado, kiel escepta pedagogia helpilo por la plibonigo kaj diversigo de la instruado de lingvoj, kiel faktoro de kultura pliriĉiĝo, de socia progreso kaj paco ;
- rekomendas al la parolantoj kaj simpatiantoj de Esperanto sekvi tre atente la evoluon de la leĝpropono - nun en preparo ĉe la Nacia Asembleo - koncernanta la enkondukon de Esperanto en la unuagradan, duagradan kaj superan instruadon, kiel petis la delegitaro de SAT-Amikaro al la raportanto de la leĝpropono, deputito André Delehedde, la 8an de februaro 1983 ;
- alvokas la departementajn konsilantarojn, la urbestrojn kaj la urbajn konsilantojn, kaj ankaŭ la asembleojn, la organizojn kaj la movadojn frontantajn kontraŭ la problemojn de lingva transnacia komunikado, kaj la instruistaron,
 - por faciligi, per pli bona informado kaj per decidoj, la realigon de la atendataj eblecoj, kaj la rapidan formadon de instruistoj al tiu ĉi nova instruobjekto,
 - por ke esprimiĝu promesoj kaj rezolucioj, kiel preparo al iniciatoj celantaj disvolvi la instruadon kaj aplikojn de Esperanto, tio kun konsidero al la ekonomiaj, politikaj, sociaj, psikologiaj kaj kulturaj konsekvencoj de la problemoj de lingva transnacia komunikado, de la krizo en instruado de lingvoj, de la urĝa neceso starigi novan specon de rilatoj inter la popoloj, kaj de la konstanta progresado de Esperanto tra la mondo;
 - por antaŭvidi, antaŭ 1987 aŭ por 1987, cele al solenado de la Centa Jaro de la Internacia Lingvo :

- a) atribui de nomo de Zamenhof - patro de Esperanto - aŭ de lia verko, al stratoj, placoj, instruejoj aŭ aliaj publikaj konstruaĵoj,
- b) la prezenton de D-ro Zamenhof kaj de Esperanto en ĉiuj instruejoj ;
- proponas, al la esperantistaro, doni vastan eĥon al la Esperanto-programoj de la internaciaj radiostacioj elsendantaj en tiu ĉi lingvo ;
- rekomendas al la internaciaj radiostacioj adopti Esp-on por malfermi, por ĉiuj popoloj, kies lingvojn ili ne povas akcepti pro evidentaj kialoj de praktika kaj financa karaktero, aliron al komunikado kaj informado senigitaj de ĉia lingva diskriminacio kaj de ĉia kultura hegemonismo ;
- sugestas al la lokaj, regionaj kaj naciaj radioj enkonduki rubrikojn de informado kaj/aŭ kursojn de Esperanto ekde la jaro 1983, proklamita MONDA JARO PRI KOMUNIKADO fare de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj.

T A R N - E S P E R A N T O (3 rue Roquelaure, F 81000 ALBI)

Sintezo de nia agado

- * Informo kaj propagando (novembro 1982): komunikaĵoj kaj artikoloj al la loka gazetaro ; cirkuleroj al la lernejoj (2a grado), MJC, Administracioj ; intervenoj ĉe politikaj respondeculoj.
- * Radiodissendoj : decembro 1982 : canal 104 (ALBI) : 6 radiodissendoj (10' x 6) ; januaro 83 : radio Tarn Sud (CASTRES) : 2 radiodissendoj (30' x 2) ; februaro kaj marto 83 : Radio Sud Musique (ALBI) : 6 radiodissendoj (30' x 6).
- * Malfermo de iniciadkursoj en ALBI (februaro 83) : marde je la 17a (5 partoprenantoj) ; merkrede je la 20a kaj 1/2 (5 partoprenantoj).
- * Sabaton 19an de marto 1983 : Unua kontakto kun eksterdepartementaj gesamideanoj. Ni ĝojis akcepti ĉe ni S-anon HENIN, S-inon MAURIN el La Canourgue (48) kaj S-anon CVJATUS TODOROV el Ŝumen, Bulgario, kiuj veturis al UFE kongreso de Carcassonne. Ni deziris al ili bonvenon kaj tre rapide ni vizitis la urbon. Nia bulgara amiko prelegis, tre interese, pri sia lando. Okaze de la amika aperitivo, S-ano BONNEFIS donacis al la gastoj, nome de la tuta grupo,

reproduktaĵon de la fama pentristo Toulouse-Lautrec.
Radio Sud Musique ĉeestis al tiu ĉi manifestacio. Fine
niaj amikoj tagmanĝis ĉe albiĝanaj gesamideanoj antaŭ
la forveturo al Carcassonne.

N.B. Ni pludaŭrigas radiodissendojn ĉe Radio Sud Musique
kaj ni kontaktis ankaŭ du aliajn lokajn radiojn. De antaŭ
decembro 1982 ni havas interkonsenton pri televiddissendo
en ALBI (FR3 TOULOUSE) sed ĉiam ni atendas.

PERPIGNAN : Bulgara samideano TODOROV prelegis la 15an de
marto en Perpignan kaj parolis pri la lando de la rozoj :
Bulgario. Ĉeestis ne nur malnovaj e-istoj sed novbakitoj
kaj ne-esperantistoj. La prezidanto de la Kultura E-Centro
S-ro Llech-Walter prezentis la preleganton kaj la profesoro
de la supera kurso, S-ro Boumal, tradukis.
S-no TODOROV partoprenis la fed. kongreson en Carcassonne
la 20an de marto ; la perpinjana E-centro estis reprezentita
per 16 membroj.

PARALELULOJ ABONU " ESPACE-TEMPS " (en la franca!)

Gazeto por alia vivmaniero. Aperas dumonate.
Enhavas : regulajn rubrikojn (psikologio, astrologio,
taroko, paralelaj lernejoj, ktp...) specialajn dosierojn
(dragado' - (ĉu sekslogado? - red.) - soleco - kion vi faras inter laboro
kaj dormo - esti viro nuntempe - mono... ktp.)
Senpaga ekzemplero sendota al tiuj, kiuj deziras vidi
ĝin antaŭ ol aboni.
ESPACE-TEMPS, 54 rue St Fargeau, 75020 PARIS.

B R O Ŝ U R S E R V O - L A Ŭ T E !

Jen ĉi-poste la nova, de nun valida broŝurlisto kaj
prezaro. Kune kun la julia n° de L! - fine de junio -
aperos siavice la ĝisdatigita "Adresaro". Se vi deziras
en tiu Adresaro aperigi specialajn informojn pri
vi, kaj se samtempe vi deziras mendi broŝurojn, bonvolu
plenigi la abonilon/mendilon, resendotan antaŭ la
20a de junio. Antaŭdankon!

EK,ES,TP estas ankoraŭ ne disponeblaj. TP kostos : 20FF,
ES : 10 FF. Aldonu: "Tiu, kiu ne volas morti" (Jean Rostand)
kodo : TK, prezo : 1 FF.

broŝurlisto

de SAT-Broŝurservo - "Laŭte!"

Titoloj (Aŭtoroj)	Kodo	FF
La Aperoĵoj de Ahasvero (Han Riner)	AA	15
Adamaĵoj (E.Lanti)	AD	5
Al la junuloj (Kropotkin)	AJ	8
Antropogenezo (A.Pannekoek)	AG.	8
Abundo kaj konsumsocio (J.Duboin, PV.Berthier)	AK	4
Anarkio kaj organizo k aliaj tekstoj (Malatesta)	AO	4
Amo per proverboj (Azevedo)	AP	1
Argentina novelaro, plena kolekto	AR	15
La Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)	BA	14
La Blankaj Gardistoj (Heiligstein)	BG	6
Civila Malobeemo (H.D.Thoreau)	CM	4
Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti-Ivon)	ĈS	6
Kiel diri...? E-frazeologio (Lentaigne)	DI	15
Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario)	DU	2
Esperanto in 24 pages (angla)	EA	1
Esperanto or English ? (Masson) en la franca	EE	8
Espéranto de poche (franca)	EF	3
Esperanto en 24 paginas (hispana)	EH	2,50
Esperanto su 24 pagine (itala)	EI	2
Esperanto en 24 paĝoj (kataluna)	EK	2,50
Elektio de tekstoj de Bakunin	EL	10
Por ekologia socio (Murray Bookchin)	ES	10
Etiko I (Kropotkin)	ET	12
Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti)	EV	4
La Forto de la Fortaj (J.London)	FF	3
Fronte al la Vivo (Krishnamurti)	FV	4
Abrégé de la grammaire espéranto (Lentaigne)	GE	5
Homa animo sub socialismo (O.Wilde)	HA	2
Historia materiismo - Ĝeneralaj konsideroj pri la problemo de organizado (A.Pannekoek)	HM	3
Humanitaristaj principoj (E.Relgis)	HP	2
Individuismo en Antikveco (Han Riner)	IA	6
Initiation à l'espéranto (An Kaŭ)	IE	3
La Parlamentisma Iluzio (C.A.Laisant)	IL	1
Individuista Manlibreto (Han Riner)	IM	4
La individualisma socialismo de D-ro Axel Robertson Proschowsky (Lagalaure)	IN	2
Inter Sovetaj Popoloj (Diksztejn) du vol.	IS	30
Jen la Dio! (B.G.D.)	JD	1
La Krimoj de Dio (Sébastien Faure)	KD	3
La Kvina Evangelio (Han Riner)	KE	14

S.A.T.-BROŝURSERVO

Ĵus aperis : "Ĉu militista nacidefendo estas kredebla?" de Jean Lasserre (trad. R.Laval), 36 paĝoj, 5 FF.

Tiu teksto aperis en "Cahiers de la Réconciliation" (Kajeroj por repacigado), franclingva organo de la "Internacia Movado por Repacigado. Ĉu necesas resumi la enhavon? Kaj ĉu dubi pri la respondo al la metita demando? Al kelkaj abonantoj mi jam sendis la broŝuron. Tiuj bonvolu, se tio ne estas jam farita, korekti jenan tajperaron : paĝo 9, unua linio de la 4a alineo :

"senelirejon" anst. "elirejon".

Mendoj por la tuta ĉi-jara broŝurkolekto : Al la gelaŭtuloj kiuj deziras ricevi la ĉi-jarajn novaĵojn, mi memorigu la programon (nur la du lastaj broŝuroj ankoraŭ ne aperis):

* Elekto de tekstoj de BAKUNIN

* Unu aŭ nul (Guy MARCHAND)

* Ĉu militista nacidefendo estas kredebla? (Jean LASSERRE)

* La Turo de l'Popoloj (Han Riner) (ĉirkaŭ 160-paĝa)

* Por ekologia socio (Murray Bookchin) (ĉ. 100-paĝa).

Ĉiuj tiuj broŝuroj estas/estos ofsetitaj en limigita kvanto, do certe ne restos eterne disponeblaj. Al interesatoj ni konsilas do mendi plejeble frue. Prezo por la 5 broŝuroj : 60 FF. La afrankon pagas la broŝurservo.

Ĵus reeldonita estas la ne sufiĉe konata teksteto de la fama pacista biologo Jean Rostand : "Tiu, kiu ne volas morti" (kodo : TK, prezo : 1 FF).

La 3a, reviziita, eldono de "El la kara infaneco" de VALO Ĵus aperis ofsetite. La du unuaj eldonoj estis fervore akceptitaj, kaj eĉ uzataj en progresigaj kursoj!

Prokrasto : La broŝureto "Esperanto en 24 paĝoj por katalunoj", kies manuskripto enhavis multe tro da eraroj, aperos nur post kelkaj semajnoj. La kontrolado de la manuskripto plu daŭras...

Kribo

L A V I V O D E "L!"

Printempas en norda hemisfero. Suko alsturnas la branĉopintojn kaj la folioj elburĝoniĝas. Same en L!, kiu multe floras ĉi-jare tiel ĉe maljunaj kiel ĉe novaj branĉoj. La abonnumero jam superas la pasintjaran, dum kelkaj gelaŭtuloj page malfruas... Ĉu baldaŭ la nesuperebla 400a abonanto ???

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47340 Laroque. CPPAP n° 58 651.